der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

17. Jahrgang Nr. 106 (2/1981) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Kun klaraj celoj post la X-a

Jus, kiam tiu-ĉi numero estas finredaktita, en Moskvo okazas tre grava evento, la 26a Kongreso de KPSU, kiu ne nur bilancas la lastajn jarojn da evoluo en ĉiuj sferoj de sovetunia socio sed ankaŭ donos respondojn por la estonteco de tiu granda ŝtato, respondo, tre atente observata de ĉiuj progresemaj pacamaj homoj de la mondo. 1981 estas la jaro de la partiaj kongresoj en kelkaj socialismaj landoj. Ankaŭ en GDR, kiam vi legos tiun-ĉi numeron, jam estas pasinta la X-a Partia Kongreso kaj estas fiksita la estonta politika, ekonomia, sociala kaj kultura evoluo de nia ŝtato. Jam nun oni povas certi, ke la Partia Kongreso ne fiksos komplete novajn celojn, kontraŭe, ĝi konfirmos la stabilan evoluon de nia lando, kiu daŭros certe sub pli malfacilaj eksteraj cirkonstancoj ol antaŭe. Sed la laboremo, engaĝemo kaj elano de la popolo de GDR, la konscio pri la kapablo plenumi pli altajn taskojn, estas solida garantio por la sukceso. La esperantistoj de GDR ankaŭ atingos ĉi-jare gravan etapon en sia laboro.

Fine de majo en Karl-Marx-Stadt, en la kadro de la IIIa Centra Konferenco, oni proklamos la fondon de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Tiu-ĉi fondo ja konfirmas strukturon pri io kio jam ekzistis kaj funkciis antaŭe kaj samtempe markas gravan novan kvaliton. Ni ĉiuj strebu, ke la elano de la X-a Partia Kongreso ankaŭ transportiĝos al tiu nova laboretapo de la esperantistoj en GDR.

La internacia monda situacio lastatempe rapide malboniĝis. Al nova etapo de konkurarmado plej reakciaj rondoj, aparte el USONO, volas premi la mondon. La paco estas en akuta danĝero. Ĉiuj, ankaŭ la esperantistoj, devas pri tio konscii. Esperanto nur servas al mondo paca, ne en militkirlejo. Ni faru nian kontribuon!

MEM ĉe la Monda Parlamento de la Popoloj

En la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco, kiu okazis dum septembro 1980 en Sofio, MEM estis reprezentita per kvinmembra delegitaro konsistanta el:

- *Nikola Aleksiev - honora prezidanto de MEM;*
- *D-ro Imre Pethes - prezidanto de MEM;*
- *William Gilbert - ĝenerala sekretario de MEM;*
- *Violin Oljanov - ĉefredaktoro de „Paco" kaj membro de la sekretariato de MEM;*
- *Dimitr Haĝiev - prezidanto de la bulgara MEM-komitato.*

La delegitoj partoprenis en la laboro de diversaj sekcioj de la Parlamento. Gravan rekonon al la rolo de MEM en la ĝenerala pacbatalo prezentas la elekto de ĝiaj gvidantoj kiel membroj de la Monda Packonsilantaro. Niaj reprezentantoj en ĝi estas: d-ro *Imre Pethes* kaj *William Gilbert.* Niajn gratulojn al la elektitoj!

Okaze de la laboroj de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco la bulgara MEM-komitato kaj la urba estraro de BEA aranĝis la 24an de septembro j. k. grandan packunvenon de la tuturba esperantistaro, kiun ĉeestis pli ol 200 personoj. Gravaj gastoj de la kunveno estis: la sekretario de la Monda Packonsilio *D-ro Károly Laukó,* la prezidanto de MEM *d-ro Imre Pethes* kaj la ĝenerala sekretario de MEM *William Gilbert.*

La honora prezidanto de MEM *Nikola Aleksiev* malfermis la kunvenon kun enkondukaj vortoj pri la celoj de MEM. Li donis la parolon unue al *d-ro Laukó,* kiu salutis la kunvenantojn kun bondeziro pri fruktodona laboro. Li emfazis la gravan rolon, kiun povas ludi Esperanto kiel ponto inter la popoloj.

La prezidanto de MEM *I. Pethes* rakontis pri la aktuala agado de MEM kaj pri la respondeca rolo de la MEM-delegitaro en la laboro de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco. Li esprimis dankon al la prezidanto de MPK *Romesh Chandra* pro la akcepto de kvinmembra delegitaro de MEM en la Parlamento.

La ĝenerala sekretario de MEM *W. Gilbert* salutis en la nomo de la Federacio de la Esperantistoj-Laboristoj en Francio, kiu subtenas MEM kaj kunlaboras.

La prezidanto *Pethes* kroĉis la honorinsignon de MEM al la sekretario de MPK *Károly Laukó,* al *Ĥristo Gorov* - prezidanto de BEA, Ĥristo Manolov - MEM-aktivulo, kiu jardekojn utiligas Esperanton en la batalo por paco. *Dimitro Haĝiev* - prezidanto de la bulgara MEM-komitato, *Haĥaria Ivanov* - vicprezidanto de la bulgara MEM-komitato.

La kunveno akceptis deklaron per kiu ĝi esprimas sian apogon al la laboro de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco kaj profundan esperon, ke ĝi estos grava kontribuo en la penado de la popoloj forigi la pendantan danĝeron de nuklea milito kaj la militon ĝenerale por ĉiam, ĉesigi la frenezan armadkonkuradon kaj la monstran malŝparadon de homaj fortoj kaj de rimedoj por neniigo de la vivo.

Post la oficiala parto estis prezentita riĉa arta programo.

Vereinbarung Kulturbund - Volksbildung

Kürzlich wurde eine „Vereinbarung zwischen dem Präsidium des Kulturbundes der DDR, dem Ministerium für Volksbildung und dem Zentralrat der Freien Deutschen Jugend zum Beitrag des Kulturbundes der DDR zur kommunistischen Erziehung der Schuljugend“ unterzeichnet. Dieses Dokument wird allen zuständigen Leitungsebenen der drei Unterzeichner zugestellt. Der vollständige Text kann vom Zentralen Arbeitskreis Esperanto angefordert werden. Er ist auch enthalten in „Verfügungen und Mitteilungen des Ministeriums für Volksbildung“, 28. Jahrgang, Berlin, 17. 12. 1980, Nr. 7, S. 78-80.
Im folgenden sollen einige wichtige Teile dieser Vereinbarung zitiert werden, die von besonderer Bedeutung für die Arbeit der Esperantisten sind:

I.

1. Der Kulturbund der DDR unterstützt die außerunterrichtliche Tätigkeit und das FDJ- und Pionierleben an den Schulen, in Pionierhäusern, Stationen Junger Techniker und Naturforscher und Stationen Junger Touristen.
Er unterstützt das politische, geistig-kulturelle Leben an den Schulen.

Darüber hinaus bezieht der Kulturbund der DDR Schüler in seine gesamte kulturpolitische Arbeit aktiv ein und fördert durch eigene Aktivitäten mit der Jugend und für die Jugend ihre weltanschauliche, politische, moralische, geistige und ästhetische, patriotische und internationalistische Erziehung im Sinne der Weltanschauung und Moral der Arbeiterklasse . . .

3. Der Kulturbund unterstützt die Kreisleitungen der FDJ dabei, ein interessantes und vielseitiges Pionier- und FDJ-Leben an den Schulen zu entwickeln und schafft Möglichkeiten für die Mädchen und Jungen, sich in der außerunterrichtlichen Tätigkeit, in Freizeit- und Feriengestaltung sinnvoll zu betätigen, ihre Interessen zu wecken und zu befriedigen.
Die Gesellschaften und Verbände, die Freundeskreise, Interessengemeinschaften und Fachgruppen des Kulturbundes der DDR gestalten die Arbeit mit der Schuljugend so, daß sich die Aktivität der Kinder und Jugendlichen entwickelt, daß sie zu Selbständigkeit, Verantwortungsbewußtsein und Schöpfertum geführt werden. Er gestaltet Begegnungen mit Wissenschaftlern, Künstlern und namhaften Persönlichkeiten, macht die Mädchen und Jungen mit neuen Erkenntnissen, wissenschaftlichen Ergebnissen und Kunstwerken vertraut und ermöglicht ihnen, sich in vielfältigen Formen in den Reihen seiner Gesellschaften, Freundeskreise und Interessengruppen aktiv zu betätigen . . .

II.

1. Der Kulturbund leistet in seiner Arbeit mit der Schuljugend einen Beitrag, das patriotische und internationalistische Verantwortungsbewußtsein der Mädchen und Jungen herauszubilden, der Schuljugend die progressiven Traditionen der nationalen Geschichte nahezubringen sowie heimatgeschichtliche Kenntnisse und Erkenntnisse zu vermitteln.. . .
In seinen Gesellschaften und Interessengemeinschaften schafft der Kulturbund Schülern ein Betätigungsfeld, das von der Arbeit auf dem Gebiet der kulturhistorischen Zinnfiguren bis zur Philatelie und Numismatik, von der Erforschung der Kulturgeschichte und Volkskunde bis zur Erforschung, Erschließung und Pflege der Denkmale, von der Beschäftigung mit Ur- und Frühgeschichte bis zur Mitarbeit an Ortschroniken, von der Fotografie bis zum **Esperanto** reicht . . .

III.

1. Das Präsidium des Kulturbundes, das Ministerium für Volksbildung und der Zentralrat der FDJ orientieren ihre Organe, Einrichtungen und Leitungen in allen Bezirken und Kreisen, bewährte und neue Formen der Zusammenarbeit zu fördern und zu verallgemeinern. Die Organe und Leitungen des Kulturbundes, der Volksbildung und der Freien Deutschen Jugend treffen im Sinne dieser Vereinbarung örtlich konkrete Festlegungen zur Entwicklung einer vielfältigen aufeinander abgestimmten Arbeit mit der Schuljugend. . . .

Detlev Blanke

Informado kaj argumentado V

(daŭrigo el „der esperantist“ 1/1981)

3. La informanto kaj lia partnero

3.1. Kelkaj principoj

Ni proponas kelkajn principojn, kiujn la informanto-argumentanto kun utilo povus konsideri.

1) Oni neniam altrudu sian opinion al la publiko aŭ diskutpartnero, sed respektu aliajn vidpunktojn. Sub 2.1. ni ja montris, ke ekzistas gravaj kaŭzoj por nekompreno aŭ skeptikeco pri la diskutata temo. Nur trankvila kaj saĝa, nealtrudema informado kaj argumentado povas konvinki, sed neniel fanatika persvadado.
2) Tute ne necesas, ke oni nepre klopodu konvinki ĉiun. Ekzistas homoj, kiuj ŝajnigas diskutintereson, sed envere nur havas la celon ridindigi la temon kun ĝia defendanto. Al ili oni ne dediĉu sian energion.
3) Se oni renkontas spritulojn kiuj kredas, ke ili devas iom ŝerci pri la hobio de la kunparolanto, pri tiu „stranga“ lingvo kaj ĝiaj adeptoj, oni ne tuj reagu akre kaj ne estu ofendita. Se oni kunŝercas samtempe klarigante trankvile sian vidpunkton oni gajnos pli ol en la pozo de ofendito.
4) Neniam oni mem donu eblecojn de ridindigo kaj nesobra diskuto per sia konduto. Tre facile eblas, bedaŭrinde, montri en ĉiu pli granda esperantista renkontiĝo homojn, kiuj, certe bonvolemaj kaj bonanimaj, per sia stranga konduto (klopodante kvazaŭ misiistan persvadon, havas superfluajn eksterajn simbolojn k. t. p.) tuj ridindigas la tutan temon. Jam en la jaro 1912 oni satiris pri tiaj esperantistoj. En „Lingvo internacia“ (1912, n-ro 8-10) skribas Ned

---

3. Das Präsidium des Kulturbundes orientiert seine Organe und Leitungen darauf, den Pädagogen in den Klubs der Intelligenz, Freundeskreisen und Arbeitsgemeinschaften sowie in den Gesellschaften des Kulturbundes vielfältige Möglichkeiten zur Betätigung und zur Befriedigung ihrer Interessen zu schaffen und ihnen Begegnungen mit Wissenschaftlern und Künstlern zu ermöglichen. Das Präsidium des Kulturbundes nimmt darauf Einfluß, daß Pädagogen, die Mitglieder des Kulturbundes sind, auf ihren Spezialgebieten unter der Schuljugend wirksam werden.

4. Die aktive Betätigung von Schülern und Pädagogen in den Reihen des Kulturbundes sowie von Mitgliedern des Kulturbundes, die mit der Schuljugend arbeiten, ist in vielfältiger Weise als ein wichtiger und wertvoller gesellschaftlicher Beitrag zu würdigen und anzuerkennen.

5. Den Bezirks- und Kreisschulräten wird empfohlen, Lehrgänge, Erfahrungsaustausche, Spezialkurse und andere Veranstaltungsformen des Kulturbundes auf einzelnen Fachgebieten als Qualifizierungs- und Weiterbildungsform der Pädagogen in der unterrichtsfreien Zeit zu nutzen und anzuerkennen.

6. Das Präsidium des Kulturbundes, das Ministerium für Volksbildung und der Zentralrat der FDJ machen diese Vereinbarung den nachgeordneten Leitungen bekannt. . . .“

Resumo: Eltiraĵoj el interkonsento pri kunlaboro, subskribita inter Kulturligo, Ministerio por popola klerigo kaj Libera Germana Junularo. En tiu teksto estas ankaŭ menciita Esperanto.

Katryn: „La verda kongresano, Esperante vestita, kun verdaj steloj sur la ĉapela rubando, verdaj steloj sur la poŝoj de l'jaketo, verdaj steloj sur la tuta veŝto. Li havas verdajn flagetojn sur la ĉapelo, verdajn flagetojn en ĉiuj butontruoj de la jaketo, li purigas sian nazon — abomeno per malgranda Esperanta flago".
Nu bone, tio estas forta troigo. Sed ... ni rigardu la esperantistajn renkontiĝojn kaj sincere diru, ĉu ni ĉiam povus ilin montri al la ekstera publiko ...
Pri la tuta temo de sekteco, kiu ne reduktiĝas al tiuj eksteraj simboloj, oni devas en gvidaj rondoj de la movado finfine tre serioze okupiĝi!

5) Plue gravas, ke oni nur prezentu faktojn kaj nek duonfaktojn nek dezirojn. Estas neimageble, kion oni ofte legas ekzemple en nacilingvaj informiloj nur pri la nombro aŭ pri la facileco de Esperanto. Germanlingva informilo (el FRG), ekzemple informas „Nombro de Esperanto-parolantoj: laŭ takso de prof. d-ro Mario Pei, Columbia-Universitato, Novjorko, 16 milionoj da personoj ... Studtempo por sciencisto: nur pasiva scio: 20 horojn. Ankaŭ aktiva scio: sume 40 horojn"[37])
Nenion kontraŭ prof. Pei (jam mortinta), sed li absolute ne konis la praktikan Esperanto-movadon. Lia „takso" estas absurda, kaj tion scias ĉiu esperantisto. Krome, kiel oni povas tiel abstrakte formuli „pasiva" kaj „aktiva" scioj? Kion signifas la indekso de 20 aŭ 40 horoj? Kiun nivelon oni atingis post tiom da investado? Tio estas neserioza reklamo kaj propagando. Se la varbitoj poste konfrontiĝos kun la realeco, ili povas forte seniluziiĝi. Reala kaj realisma informado donas pli solidan bazon por atingi kaj teni homojn.

6) Ofte oni subtaksas la tre ĝeneralan fakton, ke la homoj laŭ aĝo, temperamento, interesosfero, profesio kaj kapabloj estas tre malsamaj. Tion la argumentanto nepre devas konsideri. Filologo interesiĝas pri aliaj aspektoj ol natursciencisto, pensiulon allogas eble ne la samo kio trovus la intereson de junulo. Persono tute neinteresata pri politiko certe en Esperanto vidas ion alian ol politike engaĝita funkciulo.
Do oni devas konsideri la specifan personecprofilon de la diskutpartnero respektive de aŭskultantaro (junularo, laborista brigado, rondo de sciencistoj k. s.)

7) En tre bedaŭrinda kaj malagrabla situacio troviĝos tiu, kiu prezentas eble tute bonan prelegeton aŭ informon en tute maltaŭga momento. Oni do devas konsideri la konkretan situacion. Se kunvenintaro troviĝas sub granda tempopremo ĝi nur pretos aŭskulti tre koncizan informon. Longa prelego havus katastrofan sekvon. Se la diskuttemo en iu rondo intense cirkulas pri difinitaj aferoj kiuj tute ne havas iun ajn rilaton al la lingva problemo, certe estas malsaĝe ĝuste tiam levi la problemon de Esperanto. Homo dormema aŭ avidanta iom da silento (ekzemple en trajna kupeo) certe ne tro ĝojus aŭskulti longan prelegon de la kunvojaĝanto pri la bela lingvo Esperanto.
Ĉiu aganto de Esperanto certe povus citi brilajn ekzemplojn pri tute fuŝaj kaj ridindaj situacioj. Bedaŭrinde la adepto de Esperanto fervore propagandanta la lingvon, ne ĉiam komprenas la kaŭzon de sia malsukceso.

8) Tre grava por sukceso ankaŭ estas la aliro, la rilato al la tuta internacilingva problemo mem:

a) Treege gravas, ke oni konsciu pri tio, ke en la mondo nuntempe ekzistas multaj nesolvitaj kaj nepre solvendaj problemoj: forigo de militdanĝero kaj malarmado, forigo de malsato kaj malsanoj, alfabetigado kaj klerigado de landoj el la „tria mondo" gardo de la homa medio, certigo de energifontoj, konstruo de nova tutmonda ekonomia ordo k. t. p. Inter tiuj problemoj la absolute ĉefa estas la forigo de la militdanĝero. La monda lingvo-problemo, kvankam grava, certe ne rangas en la unua vico.

b) Parolante pri la lingva problemo kaj pri ties solvo oni nepre ne forgesu, ke ĝuste **la solvo de la lingva problemo** estas la ĉefa afero kaj ne nepre la „venko" de Esperanto mem. Esperanto ja estas pro diversaj kaŭzoj konkreta, avantaĝa solvoebleco. Sed oni konsciu, ke multaj homoj tute pretas solidariĝi por la solvo de la lingva problemo, sed pro diversaj kaŭzoj ne por Esperanto. Ilin oni ne forpuŝu sed gajnu almenaŭ por aktivecoj. Lige al la unua duono de la afero.

c) Samtempe oni konsciu, ke tute ne ĉiu, eventuale interesigebla por Esperanto, nepre volas okupiĝi pri la monda lingvo problemo. Pli multaj homoj ol ĝenerale konate, interesiĝas pri Esperanto pro filologia intereso aŭ nur havas la volon apliki la lingvon. La monda lingvo-problemo, lingvodiskriminacio kaj similaj vidpunktoj ne nepre trovos ilian intereson. Do — Esperanto prezentas tre **diversajn** valorojn, kiujn oni klarigu, depende de la interesito.

d) Tre danĝere estas simpligi la tutan diskutatan problemon ŝajnigante, ke kvazaŭ ĉio estas jam tute klara. Oni agnosku, ke malgraŭ riĉaj praktikaj spertoj rilate al Esperanto, oni ankoraŭ ne povas kontente respondi ĉiujn demandojn. Kiu, ekzemple, kuraĝus aserti, ke la problemo de la normo, de la fakterminologio, de la modela prononco (do tute fundamentaj problemoj) jam estas kontentige solvitaj?!
Oni montru la kompleksecon de la problemo kaj ne timu konfesi ankoraŭ ne tute solvitajn aferojn. Oni akceptu plue, ke atributoj kiel „facila", „internacia", k. t. p. estas relativaj.

e) Tre ofte montriĝas, ke la informanto-argumentanto ne kapablas meti la mondan lingvo-problemon en la kadron de la realaj laŭleĝe evoluantaj historiaj procesoj. La sekvo estas, ke oni serĉas la nekontentigan progreson de Esperanto en lingvaj malperfektaĵoj (la sekvo estas reformemo), en la „inerteco" de la homo aŭ pro la superreganteco de la angla k. t. p. Kompreneble la historiaj procesoj ne realiĝos aŭtomate, sed nur pere de la homoj.

f) Granda eraro estas kontraŭstarigi Esperanton kontraŭ naciaj lingvoj[38]). Tio ne nur estas profunde malĝusta sed ankaŭ taktike malsaĝa. La naciaj lingvoj estas gravega identigilo de la aparteneco de homo al sia etno. La naciaj lingvoj ludas kaj ankoraŭ longe ludos fundamentan rolon en la vivo de la homaro kaj ankaŭ la rolo de diversaj lingvoj kiel **internaciaj** komunikiloj ne malkreskos sed eĉ ankoraŭ pligrandiĝos. Tion

oni devas klare vidi. En la nuna historia etapo, karakterizita de la profunda krizo de la kapitalismo, de la plifortiĝo de nacia suvereneco kaj memstareco, de la solviĝo de multaj enŝtataj aŭ regionaj lingvoproblemoj (ekz. en Afriko kaj Azio, sed ne nur tie) la devizo ne estas Esperanto **aŭ** naciaj lingvoj, sed, Esperanto **kaj** naciaj lingvoj. Aŭ, kiel formulis M. Isajev:

„— Estu multnombraj naciaj lingvoj!
— Estu la interpopolaj lingvoj!
— Estu la mondaj lingvoj (rusa, angla, franca, hispana, araba, ĉina)!
— Kaj estu ankaŭ la internacia helplingvo!“[39])

(Ĉe tiu citaĵo oni eble rajtos dubi ĉu la araba kaj la ĉina jam apartenas al la „mondaj“ [= internaciaj] lingvoj)

g) Kaj laste, parolante pri la „neŭtraleco“ de Esperanto oni klare difinu, kion oni volas esprimi per tio. Certe oni ne supozigu, ke la parolantoj de Esperanto estas neŭtralaj kaj socie neengaĝiĝemaj.

Notoj

[37]) T. Carlevaro/G. Lobin (Red.): Einführung in die Interlinguistik, Alsbach 1979, p. 130

[38]) Kp. W. Gilbert: Esperanto kontraŭ naciaj lingvoj? en GDR-Paco 1979. p. 27

[39]) M. Isajev en D. Blanke (Red.): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Budapest 1978, p. 215

Ĉu aktivadi en izolo?

Ekzistas homoj diverskarakteraj. Iuj volonte donas siajn kapablojn en kunlaboran kadron por tiel kontribui al komune akirotaj rezultoj. Sed ankaŭ ne malofte ni renkontiĝas tre amindajn izolulojn. Jes, amindaj, ĉar ili diligentaj kiel formikoj pri io laboradas, ekzemple verkas vortaron, lernolibron aŭ ion alian bezonutan (atentu la -u-!). Jes bezonutan, se, ja se ili tenus kontakton kun kompetentuloj por tiel fruktuzigi racie la entuziasmon, kapablon kaj laborpreton.
Bedaŭrinde ne ĉiu pretas forlasi la izolemon kaj hejme sidadas kaj laboras pri io, pri kio bedaŭrinde la „mondo“ (mi celas la esperantistan) aŭ tute nenion aŭ nur ion ekscias post la morto. Forpaso antaŭnelonga de tre ĉarma homo, de Karl Moser el Templin, min pensigis supre-direkte. Homo bonkora, modesta kaj tre enamiĝinta en Esperanton, li verkegis multvoluman vortaron Esperanto-germanan. Nur post lia morto, ni unuan fojon eksciis pri tio. Mi ne volas prijuĝi la valoron de la materialoj. Tion faru kompetentaj leksikografoj. Bedaŭrinde eĉ al laiko fariĝas klaraj, ke kunligiteco al niaj vortaristoj povintus fariĝi utila kaj por nia forpasulo kaj eble por la vortaristoj.
Tiun sperton ni danku al Karl Moser. Ne restu en la izolo se vi kredas verki ion interesan aŭ gravan! Informu Centran Laborrondon, kiu estas la fake sole kompetenta estraro de la Esperanto-movado en GDR. Konfidu al ĝi viajn planojn, laborojn, rezultojn! Certe ne malofte CLE povas nodi kontakton inter vi kaj samteme laborantoj, aŭ konsili, helpi kaj gvidi vin. Tion ni lernu de Karl Moser, tiu ĉarma, diligenta kaj laborema homo, homo izolinta sin mem, bedaŭrinde.

D. B.

Fama sciencisto kaj esperantisto

Rememore pri profesoro d-ro Georg Sörgel (1911-1961)

Eble nur malmultaj scias, sed certe la pli aĝaj esperantistoj el GDR, ke la natursciencisto, nacipremiito profesoro d-ro Georg Sörgel el Quedlinburg, ludis gravan rolon en la unua etapo de la revigligo de organizita Esperanto-movado de GDR. 1981 en du rilatoj estas jaro de rememorigo pri profesoro Sörgel. La 16an de aprilo oni povintus festi lian 70an naskiĝtagon. Sed la 12an de julio 1961 li mortis. Do post tiam pasis 20 jaroj. Georg Sörgel jam eklernis Esperanton en sia junaĝo. Kiam li post la milito, en la jaro 1948, eklaboris en Quedlinburg ĉe la Planinstituto post kelkaj jaroj en tiu urbo ekfunkciis la unuaj Esperanto-kursoj, laŭ lia iniciato. Ilin gvidis s-ro Haupt.

Profesoro Sörgel en Esperanto vidis unuavice la praktikan komunikilon. Liaj ligoj kun multaj esperantistaj botanikistoj el diversaj landoj, inter ili kun profesoro Neergaard el Danio, alportis al li multajn fakajn utilojn. Inter alie li ricevis pere de tiuj ligoj plej diversajn semojn de mikrofungoj, kiujn li povis bone utiligi por sia scienca laboro. Profesoro Sörgel havis multajn planojn. Li ekzemple volis verki tutmondan mapon pri fungoj kaj ankaŭ komencis skribi lernolibron de Esperanto. Lia subita morto finis ĉion. La 12an de julio li mortis, kiam glitilo, per kiu li ŝvebfluge veturis, malsupren falegis. La profesoro tuj forpasis.

Profesoro Paul Neergaard, kiu kun Georg Sörgel interamikiĝis dum internacia botanika kongreso en Libano, kie oni ankaŭ utiligis Esperanton, skribis en la revuo „Esperanto“ de UEA 11/1961:

„Sörgel estis eminenta mikrologo kaj plantpatologo. Kun emocio mi memoras lian feliĉon pro sia kunestado kun kolegoj en Libano, kiam mi amikiĝis kun li . . . Longe postrestos la memoro pri lia delikata personeco, lia fekunda entuziasmo kaj energio en la kampo de sia fako kaj de Esperanto. kaj, longe ankoraŭ postefikos kaj donos fruktojn lia sindonemo ka iniciatemo“.

Ni do omaĝu en la nuna jaro je unu el niaj pioniroj.

(laŭ materialo de Hartmut Sörgel)

Internaciaj aranĝoj 1981

— elekto —

D — dato
L — loko
N — nomo de la aranĝo
OK — Organiza Komitato
P — prezo
A — Aliĝdato
M — Maksimuma nombro de partoprenantoj

Bulgario

D: septembro 19. — 29. L: Velingrad
N: VI. Internacia Esperantista Seminario-Ferio (IESF)
OK: Esperanto-Societo, p. k. 7. BG-4600 Velingrad
P: 150 levoj A: 1981 sep. 10 M: 120 personoj

D: dec. 29. — jan. 2. 82 L: Varna
N: Novjara Renkonto T: i. a. silvestra balo
OK: BEA, Internacia Esperanto-Kursejo, Centra Estraro, p. k. 791, BG-1090 Sofio 9
P: 100 levoj

CSSR

D: julio 5. — 18. julio 19. — aŭgusto 1., aŭgusto 2. — 15.
L: Lanĉov, Moravio N: Somera Esperanto-Tendaro (SET)
T: diversgradaj E-kursoj, tendarfajroj, ekskursoj k. t. p.
OK: Esperanto-klubo, ČS-674 01 Třebíč
P: 1200 ČS-kronoj, por gejunuloj ĝis 15j. 1000 ČS-kronoj
A: 1981 apr. 15. M: 100 personoj
R: La tri datoj signifas tri etapojn de SET; la prezo kaj maksimuma nombro de partoprenantoj validas por ĉiu unuopa etapo

D: julio 11. — 24. L: Dedinky-Mlynky, Slovakio
N: Somera Esperanto-Lernejo (SELKO)
O: Orientslovakia Regiona Komitato de AESSR kaj Esperanto-Klubo en Košice
K: Esperanto-Klubo, Dom umenia, ČS-041 23 Košice

D: julio 24. — 30. L: Slovaka Paradizo, Slovakio
N: Turisma Semajno (TUSE)
O: Orientslovaka Regiona Komitato de AESSR kaj Esperanto-Klubo en Spišská Nová Ves
K: P. Pavúk, Konrádova 6/8, ČS-052 01 Spišská Nová Ves

D: aŭgusto 14. — 17. L: Žilina, Slovakio
N: Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko
O: AESSR kaj Esperanto-Klubo ĉe Sindikata Domo en Žilina
K: L. Hanzel, Obrancov Mieru 25, ČS-010 01 Žilina

D: aŭgusto 15. — 23. L: Žilina, Slovakio
N: 3a Renkonto de Esperantistaj Familioj (REF)
T: edukado de denaskaj e-istoj, seminario, promenadoj
OK: Csiszár, Ernö, Kulich Gy. u. 25. V. 16, H-8100 Várpalota, Hungario
P: 630 ČS-kronoj A: 1981 marto 1. M: 50 personoj

D: aŭgusto 15. — 23. L: Nova Hut, Ceĥio
N: Turisma Esperanto-Feriado en Montaro Šumava
O: E-rondeto „La ponto“ ĉe Kultura Klubo JITEX en Písek
K: L. Křivánek, Zborovska 1332, ČS-397 01 Písek
P: 15 ČS-kronoj por ĉiu nokto M: 30 personoj

D: aŭgusto 18. — 23. L: Žilina, Slovakio
N: Turismaj tagoj (TUTA)
O: Esperanto-Klubo ĉe la Domo de Sindikatoj en Žilina
K: L. Hanzel, Obrancov Mieru 25, ČS-010 01 Žilina
P: 330 ČS-kronoj A: 1981 junio 30 M: 150 personoj

Hungario

D: julio L: Zanka
N: 14a Pionira Internacia Tendaro (PIT)
T: lingvoperfektigado, šipekskurso, sportludoj
OK: Teritoria Komitato de HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs
P: 1500 forintoj A: 1981 jan. 31. M: 220 personoj
R: La aranĝo daŭros du semajnojn; aliĝoj en grupoj po 10 — 20 personoj, grup-gvidantoj partoprenos senpage

D: julio 1. — 10. L: Szentendre
N: Internacia Junpionira Tendaro
OK: Departementa Komitato de HEA, Somogy-Bacsó part 17, H-2000 Szentendre

D: julio 5. — 11. L: Gyula
N: 19a Somera Esperanto-Universitato (SEU)
T: sciencaj kaj artaj prelegoj, sinbanado en kuracbanejo, ekskurso, koncerto, filmo, ekologia kunveno, perfektiga kurso de Esperanto por pedagogoj
OK: Konsilantaro de SEU, 48as u. 11, H-5700 Gyula
P: 1600 — 2000 ft. A: 1981 junio 1. M: 250 personoj

D: julio 20. — 29. L: Abaliget
N: 14a Internacia Renkonto Naturamika (IREN)
T: perpiedaj kaj busaj ekskursoj, perfektigaj kursoj, konkursoj, distraj vesperoj
OK: Teritoria Komitato de HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs
P: inter 1750 kaj 2500 ft. depende de kategorio de loĝejoj, 1550 ft. por personoj kun propra tendo
A: 1981 junio 20. M: 100 personoj

D: julio 31. — aŭg. 10. L: Balatonfüred
N: Porinfana Amikeca Renkontiĝo
T: studhoroj, ludoj, ekskursoj, popoldancado, kantado, sinbanado en Balatono
OK: Csiszár, Ernö, Kulich Gy. u. 25. V. 16, H-8100 Várpalota
M: 100 personoj
R: Cefe por infanoj 8 — 13 j.; pli junaj infanoj povas partopreni kun siaj gepatroj

D: aŭgusto 2. — 13. L: Eger
N: Somera Esperanto Lernejo en Eger (SELE)
O: Departementa Komitato de HEA en Eger
K: Könczöl, Ernö, Sóház u. 13, H-3300 Eger
P: 2600 ft. A: 1981 julio 1. M: 100 personoj

D: novembro 6. — 8. L: Eger
N: 3a Studenta aŭtuna forumo (SAF)
T: Scienca kaj faka aplikado de Esperanto — prelegoj kaj seriozaj, lacigaj diskutoj
OK: Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj, Pf. 193, H-1368 Budapest
P: 300 ft. (provizora prezo) M: 70 personoj

D: dec. 28. — jan. 2. L: Budapeŝto
N: 11a Vintra Esperantista Ferio (VEF)
T: konatiĝo kun Budapeŝto, silvestra balo
OK: Teritoria Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest
P: 2300 ft. A: 1981 nov. 10. M: 300 personoj

Varna logas!

La Internacia Esperanto-Kursejo, p. k. 791, 1090 Sofia, Bulgario, dum la sekva jaro 1981 organizas kursojn por studado de Esperanto en sia filio en urbo Varna. Dum la 14-taga restado tie, la partoprenantoj kombinos la agrablan pasigon ĉe la bordo de Nigra Maro kun kulturaj okupoj kaj la lernado de la Internacia Lingvo. La programo antaŭvidas po du kursojn monate de la komenco kaj de la mezo de la monato. Laŭ la sezono, la takso por partopreno varias de 154 ĝis 210 lv (m. junio kaj septembro). Monato julio estas antaŭvidita por grupoj da lernantoj, kaj de la 1a ĝis la 14a de aŭgusto — por studentoj po 168 lv por unu partoprenanto. La tradicia Novjara balo estas antaŭvidita de la 29a de decembro 1981 ĝis la 2a de januaro 1982 j.
La kursaj okupoj komenciĝas en la matenaj horoj (8 — 11 h.), kaj post tio, de la 11a ĝis 13a horo — strando kaj banado en la maro (interparoloj sen nigra tabulo). La posttagmezaj horoj estas dediĉitaj por promenadoj, ekskursoj per aŭtobuso ĝis urbo Balĉik kun vizito de la palaco de la iama rumana reĝino ĝis la departementa centro Tolbuĥin, ĝis la monumento de Vladislav Varnenĉek. Kiel estas akceptite en la programo, estas inkluditaj interkonatiĝaj vesperoj en la komenco kaj adiaŭa en la fino de la grupo. La unua tago komenciĝas per vespermanĝo kaj la lasta finiĝas per tagmanĝo. Por enskribo kaj rezervigo antaŭa de lokoj (unuope kaj grupe) estu aranĝataj antaŭe de MES je la montrita adreso. Agrablan kaj utilan ripozon!

SEFT 1980 — pluva, sed tamen

La ĉijara Somera Esperantista Familia Tendaro 1980 tre suferis sub preskaŭ daŭra pluvo. Tamen malgraŭ tio ankaŭ SEFT 80 fariĝis granda sukceso. Oni helpis sin reciproke, kaj la etoso estis bonega.
Partoprenis entute 56 personoj el GDR, Bulgario, ČSSR, Pollando kaj Hungario. Cirkaŭ la duono estis junuloj. Oni loĝis en 22 tendoj kaj uzis 11 aŭtomobiloj. (En la plej malgranda tendo loĝis la kobajo „Olti“.)

Informoj el GDR

Ankaŭ 1981 okazos SEFT

De la 22a ĝis 29a de aŭgusto sur tendejo C-86 en Thomsdorf ĉe Feldberg (Neustrelitz) en rave bela lagoplena kaj arbarorića (fungologa) pejzaĝo okazos SEFT 81.

Oni nepre komprenu, ke **ne** ekzistas organiza komitato, devigita prizorgi ion ajn!! Ĉiu venas memstare kaj prizorgas sin mem (tendo, manĝado).

Eksterlandanoj (el socialismaj landoj) povas aliĝi surloke.

Interesuloj el GDR devas anonci sin ĉe Campingplatzvermittlung, 2060 Waren, Am Kietz 14.

Planu jam nun SEFT 1982!

Jubileo de aktiva grupo

La 16an de januaro 1966 estis fondita la Subdistrikta Laborgrupo Esperanto en Schwerin (Ŝverin). Pro tio la ŝverinanoj post precize 15 jaroj havis okazon jubileofesti kun 32 ĉeestantoj. La unua Distrikta sekretario de KL kaj la Subdistrikta sekretario de KL omaĝis la multflankan agadon de tiu aktiva grupo, gvidata de s-ro Franz-Peter Kurtz. 5 grandaj artikoloj en la gazetaro informis pri la jubileo kaj pri Esperanto.

Semajnfina Esperanto-seminario en Schwerin

La unuan fojon la DLE kaj SLE Schwerin aranĝis pasintjare intensivan kurson. Gi okazis la 18an kaj 19an de oktobro en Schwerin. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 30 geesperantistoj el la tuta distrikto. Ankaŭ la prelegintoj venis el nia distrikto. Parte ĉiuj ĉeestantoj aŭdis komune la prelegojn, parte en du diversaj grupoj.

S-ro Buth el Güstrow informis pri la kreinto de Esperanto, d-ro Zamenhof kaj ties vivo. La aŭtoro de nia nuna lernolibro, d-ro Dahlenburg demonstris la instrumetodon pere de sia lernolibro. La progresintoj kiuj mem instruas aŭ instruos estis tiamaniere informitaj pri la aranĝo kaj preparo de interesaj instruhoroj, kaj la gekomencantoj samtempe lernis Esperanton. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne ĉiam instruas tiel konsekvence laŭ tio sistemo — certe ni povus tiamaniere atingi pli grandan sekceson en niaj kursoj. La progresintoj aŭdis sonbendprelegon de d-ro Blanke pri UK en Stockholm kun originalaj sonbendigoj el la kongresejo. Pri la terapia rajdado raportis d-ino Thorman. Tiamaniere ni aŭdis interesajn faktojn pri tiu ĉi speciala medicina temo kaj ties rezultoj. S-ro E. Diedrich prelegis pri la temo „Cu Esperanto estaŝ la latino de la proletaro?". Post ĉiu prelego kaj dum la lingvaj ekzercadoj la ĉeestantoj havis la eblecon demandi kaj diskuti. Sed ni ne nur streĉe laboris, sed ankaŭ amuziĝis kaj lernis komune kantojn. Prezentita de gesinjoroj Güse estis la legendo de „Fritze Bollmann". Prezentita ankaŭ estis spektakleto „La surprizo".

Finfine mi povas konstati, ke tiu ci intensivkursa semajnfino estis sukcesa kaj devus, laŭ la deziro de la partoprenintoj, ne esti la lasta en nia distrikto.

Franz-Peter Kurtz

Tihvin kaj Roßwein

Jam dum multaj jaroj Johannes Dittrich, estro de la Esperanto-grupo en Roßwein, tenas amikan kontakton al sia korespondamiko Aleksandro Kogan el Tihvin/USSR. Aleksandro Kogan, kiu jam kelkfoje vizitis nian landon, liveris al la iama fakinstruisto kaj teknikisto el Roßwein interesegan materialon pri „Veldado en la kosmo". Tiu ruslingva prelego de I. O. Patou el Kievo estis de A. Kogan esperantigita kaj sendita al sia amiko Dittrich. Tiu tuj disponigis la materialon en la germana traduko al la uzina faklernejo de Forĝejo-uzinoj „Hermann Matern", kie specialistoj tre alte taksis la materialon. Jam multfoje Johannes Dittrich prelegis en la faklernejo, antaŭ profesilernantoj kaj kompreneble oni tre ekinteresiĝis pri Esperanto kiel utila peranto de teknikaj scioj. Cetere, jam ofte oni povis legi pri Tihvin en la uzina gazeto „La forĝisto". Kiel aktivulo de la „Societo por germansoveta amikeco" Johannes Dittrich povas montri multajn konkretajn aktivaĵojn, realigatajn helpe de Esperanto.

Kontrakto inter Schwarzenberg kaj Karlovy Vary

Surbaze de la kontrakto pri kunlaboro kaj amikeco inter CEA kaj CLE bone evoluas diversaj rilatoj inter unuopaj grupoj. Al ili apartenas la grupoj de Karlovy Vary kaj de Schwarzenberg, kiuj subskribis la 28an de septembro 1980 kontrakton pri kunlaboro. En 10 punktoj oni fiksas konkretajn planojn de komuna agado, i. a. amikecajn renkontiĝojn, interŝanĝo de materialoj kaj informoj, ekligo de personaj rilatoj kaj organizado de feriaj restadoj. Krome oni antaŭvidas komunajn amikecaranĝojn. Subskribis la kontrakton la grupestroj Jarosla Klement kaj Rudolf Eichler.

El Sovetunio

Ekspozicio pri sporto

En novembro 1980 dum du semajnoj en granda solono de la Centra Kulturpalaco „Oktobro“ (urbo Nijnevartovsk-USSR) estis organizita granda prisporta ekspozicio, dediĉita al Olympiado-80 kaj sporto en Sovetio kaj en socialismaj landoj. La ekspozicio estis aranĝita per aktivuloj de Nijnevartovska Esperanto-klubo laŭ la decido de Konsilio de Internacia amikeca klubo kunlabore kun urba Junkomunista Komitato. Pri la evento informis la urbaj kvar gazetoj. Sur la 12 grandtabuloj estis eksponitaj pli ol 200 da afiŝoj, gazetoj, salutleteroj, dokumentoj, libretoj, kartoj, fotoj kaj aliaj objektoj, ricevitaj el multaj eŭropaj landoj. La ekspozicio vekis grandan intereson. Aparte impresitaj estis la junularo kaj sportistoj. Cent kvindek urbanoj ekdeziris lerni la internacian lingvon kaj jam ĉeestis en Esperanto-kursoj. Pli ol 15 miloj da urbanoj de Nijnevartovsk vizitis la ekspozicion, dankis la organizantojn de la ekspozicio kaj petis aranĝi denove en la jaro 1981 porpacan pli grandskalan ekspozicion kun interesaj pacbatalantaj materialoj el socialismaj landoj.

T. Ŝuvajev, Nijnevartovsk

Skribu al Ternopol!

Novembro 1980 en urbo Ternopol (Ukrainio) estis fondita Esperanto-Societo de internacia amikeco „Amikeco“. Por montri al neesperantistoj ke Esperanto taŭgas por internaciaj ligoj ni petas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj unuopajn esperantistojn en la tuta mondo sendi al ni leterojn aŭ poŝtkartojn kun bondeziroj kaj proponoj pri konkretaj ligoj. La alvenintajn poŝtsendaĵojn ni uzos kiel propagandmaterialon por Esperanto. Ĉiu letero aŭ karto estos respondita. Nia adreso: Esperanto-Societo „Amikeco“, 281 001 Ternopol, pk. 83, USSR. Ni petas ĉiujn Esperanto-revuojn publikigi analogan sciigon.

Ekspozicio de infandesegnaĵoj

Esperanto-klubo en la siberia urbo Krasnojarsk planas organizi ekspozicion de infandesegnaĵoj el diversaj landoj. Temo de la ekspozicio estas „Infanoj de la mondo vivu en paco!“

Desegnaĵojn sendu laŭ la adreso: USSR, 660 075, Krasnojarsk, p.k. 2420, Esperanto-klubo.

Reciproke ni sendos al vi desegnaĵojn de sovetiaj infanoj aŭ bildkartojn pri nia urbo aŭ esperantaĵojn. La gajnontoj de unuaj lokoj ricevos premiojn. Sur dorsan flankon de la desegnaĵo post la titolo skribu la nomon kaj la familinomon de aŭtoro, aĝon, landon kaj laŭeble adreson.

Ni esperas je aktiva reeho de multaj E-kluboj kaj organizaĵoj. Infandesegnaĵoj servu al amikeco kaj paco en la mondo!

Krasnojarska Esperanto-klubo

Helpu al Vladivostok!

En For-Orienta haven-urbo de Soveta Unio Vladivostok antaŭ relative nelonga tempo ekĝermis Esperanto-klubo. Nun la klubo ricevis ejon ĉe la novkonstruita Regiona Domo de Junularo. Por E-ekspozicio, dediĉota al la solena malfermo de la Domo, la juna klubo bezonas helpon ankaŭ de la tutmonda esperantistaro. Vi povos kontribui diversmaniere, tio dependos de viaj bontrovo kaj eblo. Ankaŭ nuraj gratulkartoj bonvenus! Nia adreso: USSR, 690 039 Vladivostok-39, avenuo de 100 let Vladivostoku, 103, Regiona Domo de Junularo, Esperanto-klubo. Anticipe korajn dankojn!

Litova tendaro

Dum junio 1980 okazis esperantista tendaro en Giruliai apud Balta maro kun partopreno de 80 personoj el 7 litovaj urboj kaj gastoj el Latvio, Belorusio kaj Rusia Federacio, alia tendaro apud la lago Arimaiĉiai kun partopreno de 40 personoj el 6 urboj de Litovio.

(El „Horizonto de Soveta Litovio“ 5/1980

Ĉiulandaj pacpropagandiloj serĉataj

Por siaj jam tradiciĝintaj migrantaj porpacaj ekspozicioj Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn plakatojn, sloganojn, flugfoliojn, fotojn, desegnaĵojn, librojn, revuojn, insignojn, glumarkojn, protestkanzonojn kaj ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. Krome estas akceptataj ĉiuspecaj materialoj alvokantaj al mediprotektado, amikeco, internacia kunlaboro, interkompreniĝo kaj aliaj mondskale gravaj temoj.

Laŭdezira rekompenco, en formo de libroj, revuoj, bildkartoj, sondiskoj, diapozitivoj, memoraĵoj k. t. p. garantiata! Bv. adresi ĉion al: Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco, SU - 703 000 Samarkando, glavpoŝtamt, p. k. 76, Uzbekistano.

Validas ĉiam! Represo kaj nacilingvaj anonctradukoj petataj!

Redaktas: Dieter Berndt

Legu kaj lernu! Lies und lerne! (8)

Esperanto kaj ŝako

Inter la esperantistoj estas multaj ŝatantoj de la ŝakludo. Ili estas organizitaj en „Esperanta Ŝak-Ligo Internacia“ (EŜLI). Kiu el vi interesiĝas pri ŝakludo, povas pli multe legi en „der esperantist“ n-ro 3/78. Tre ŝatata inter la esperantistoj-ŝakistoj estas la „koresponda ŝako“.
Legu nun pri la plej longa koresponda ŝakpartio.
Ĝi komenciĝis en la jaro 1856. En tiu ĉi jaro iu viro forlasis Anglujon por transloĝiĝi al Aŭstralio. Ie en la mezo de la lando, 500 km for de la ĉemaraj grandaj urboj, li akiris farmon kaj komencis bredi ŝafojn. Antaŭ la forveturo li interkonsentis kun sia frato, kiu restis en la vilaĝo en Kimrujo, ludi koresponde ŝakon.
Tiam ankoraŭ ne ekzistis flugmaŝinoj kaj la plej multaj ŝipoj estis velŝipoj. De Anglujo al Aŭstralio ili veturis proksimume 100 tagojn. La poŝto bezonis 10 tagojn por transporti la leteron de la vilaĝo en Kimrujo al Londono. Same tiom da tempo bezonis la poŝtrajdisto en Aŭstralio inter la havenurbo kaj la farmo. Do, unu movo de la ŝakpartio daŭris 120 tagojn inter Kimrujo kaj la farmo en Aŭstralio. Reen denove tiom. La respondo, do, ne alvenis ĉiam pli frue ol post 240 tagoj.
Dum 27 jaroj ili faris 40 movojn. Subite mortis la frato en Aŭstralio. Li estis pli aĝa kaj mortis ĝuste antaŭ la venko. Liaj filoj, kiuj ne scipovis ŝakludi, informis la onklon en Kimrujo pri la morto de la frato kaj postulis, ke li deklaru sin venkita. Sed la onklo rifuzis fari tion. Fine ili prezentis la aferon al arbitracianto de granda Londona ŝakklubo. Li decidis jene: se ŝakisto dum la partio mortas, la rezulto estas sendecida, kiel ajn favora aŭ malfavora la partio por iu aŭ alia estas.

Klarigoj

ŝatanto	— Liebhaber (ŝat-ant-o);
korespondi	— korrespondieren, in Briefwechsel stehen;
koresponda ŝako	— Fernschach;
partio	— Partie (im Spiel), aber auch Partei;
Anglujo	— England (auch Anglio);
transloĝiĝi	— umziehen, übersiedeln (trans-loĝ-iĝ-i);
farmo	— Farm;
ŝafo	— Schaf;
vilaĝo	— Dorf;
Kimrujo	— Wales;
flugmaŝino	— Flugzeug (flugi + maŝino), auch aviadilo;
velŝipo	— Segelschiff (velo + ŝipo), velo = Segel;
transporti	— befördern;
poŝtrajdisto	— Postreiter (poŝt-rajd-ist-o);
havenurbo	— Hafenstadt (haveno + urbo);
movo	— hier: Zug beim Schachspiel, sonst auch Bewegung;
deklari	— erklären;
deklari sin venkita	— sich als geschlagen zu bekennen;
rifuzi	— verweigern, ablehnen;
arbitracianto	— Schiedsrichter (arbitracii = schiedsrichterlich entscheiden);
jene	— folgendermaßen;
sendecida	— unentschieden (sen + decido).

6. Schriftprobe (mit wörtlicher Übersetzung) - Notizschrift -



Esperanto hodiaŭ en la tuta mondo havas adeptojn. Ili aprezas
Esperanto heute in der ganzen Welt hat Anhänger. Sie schätzen



la internacian lingvon kiel rimedon de kompreno inter
die internationale Sprache als Mittel der Verständigung
zwischen



la popoloj de diversaj naciaj lingvoj. Esperanto estas
den Völkern verschiedener nationaler Sprachen. Esperanto ist
(eine)



neŭtrala lingvo, kiu estas facile lernebla de ĉiuj homoj.
neutrale Sprache, welche ist leicht erlernbar von allen Menschen.

(Aus: Schödl, "Wir lernen Esperanto sprechen")

Jen nova Esperanto-stenografio:

Otto Möller (5630 Heilbad Heiligenstadt), Heinrich-Rau-Straße 1), adaptis la en GDR uzatan „Germanan Stenografion" por Esperanto. Eldonis ĝin kiel apartan broŝureton la „Gesellschaft für Stenografie und Maschineschreiben der DDR" (1054 Berlin, Mulackstraße 30), kie ĝi estas ricevebla por M —,80 aŭ ĉe CLE.

Pri la stenografio kaj pri Esperanto ankaŭ raportis „Der Stenopraktiker" 3/80, p. 219, Berlin.

TEJO-seminario pri aplikado de Esperanto

La kunlaboro de TEJO kun kelkaj okcidenteŭropaj junularaj organizoj — ĉefe Eŭropa Junulara Fondaĵo (EYF) — restarigita en 1979 de la KER-deĵoranto donis gravan frukton: TEJO organizis en junio 1980 seminarion sub la temo „Internacia komunikado — aplikado de Esperanto". Gin partoprenis pli ol 30 junaj esperantistoj el 13 ĉefe okcidentaj landoj. La laborkondiĉoj estis unike bonaj: moderna seminariejo en la Eŭropa Junulara Centro, senpaga partopreno, repago de vojaĝkostoj, uzebloj de modernaj teknikaj instalaĵoj.

La programo de la tutsemajna aranĝo unuavide estas aloga:
— varbado (enkondukis C. Piron) / — instruado (prelegis C. Gacond) / — organizado de lokaj grupoj / — rolo de Landa Sekcio en TEJO (prel. B. Cassini/S. MacGill /
— praktika aplikado de E-to / — novaj direktoj por KER-agado (prel. R.Corsetti.

Oni tamen ne povas pretervidi ke ankaŭ en ĉi tiu seminario montriĝas la problemo de la nuna TEJO-laboro: Konsekvenca malatento al sociaj procesoj kaj interŝtataj rilatoj. Malantaŭ ĉiu programero staras la silenta demando: Kiel ni trudas Esperanton al la ekstera mondo? Laŭ mi oni devus lerni el la agado de UEA kaj malfermi la Esperanto-movadon al la mondo, diskutante ĝenerale interesajn temojn. Tion devus respeguli ankaŭ tiaj gvidantulaj seminarioj.

M. Lennartz (uzinte TEJO-materialon)

LA III-A TUTLANDA ČIUJARA INTERKONSILIĜO DE KOLEKTIVO ESPERANTO – INTERLINGVISTIKO (Timisoara, 13.-14. septembro 1980)

La III-a Interkonsiliĝo de K.E.I. ĝuis, samkiel en la pasintaj jaroj, multnombran partoprenantaron konsistintan el profesoroj, sciencaj esploristoj, gazetistoj, gestudentoj — E-parolantoj kaj/aŭ esplorantoj de diversaj aspektoj de la internacia lingvo — el la urboj Arad, Baia Mare, Brasov, Bukureŝto, Cluj-Napoca, Constanta, Galati, Odorheiu Secuiesc, Pitesti, Resita, Roman, Sfintu Gheorghe, Sibiu, Suceava, Timisoara, Tirgu Mures k. a. La Interkonsiliĝon, kies laborojn malfermis prof. d-ro I. Fl. Bociort, la kolektivestro, salutis d-ro Ion Iliescu, direktoro de la Centro de sociaj sciencoj en Timisoara, kaj prof. d-ro Vasile Serban, dekano de la Filologia fakultato en la Universitato de Timisoara. Sekvis la raportoj de la subkolektivestroj, kiuj menciis, inter la ĉefaj atingaĵoj dum la pasinta jaro depost la antaŭa Interkonsiliĝo (bv. vd. **der esperantist,** nr. 99: 1/1980, p. 10—11), la aperigon de kelkaj verkoj ellaboritaj de K.E.I.-anoj: la kajero **Lucrari practice de esperanto-interlingvistica** (Praktikaj laboroj de E kaj interlingvistiko), Timisoara, 1979, II-a eld. 1980, de prof. d-ro I. Fl. Bociort, la universitata lernolibro **Lingvistica generala si comparata** (Ĝenerala kaj kompara lingvistiko), Pedagogia kaj didaktika eldonejo, Bukureŝto, 1980, de prof. d-ro A. Vraciu (Univ. de. Iasi) — kun densa ĉapitro pri la planlingvoj, respegulanta la nunan staton de la rumana esperantologio —, **Dictionar practic pentru studentii straini** (Praktika vortaro por alilandaj studentoj) Cluj-Napoca, 1980, de univ. lekc. d-ro V. Paltineanu — kun leksikaj ekvivalentoj en sep lingvoj, inter kiuj ankaŭ en E —, kaj **Dictionar esperanto-român si român-esperanto** (Unua parto), Bukureŝto, 1980, de pluraj kunaŭtoroj sub la kunordigado de la subskribinto.

Laŭ la organiza vidpunkto, la konsisto de K.E.I. pliampleksiĝis, okaze de ĉi tiu Interkonsiliĝo, per la kooptado de aliaj 20 membroj. Dum la organiza parto de la unua labortago, oni starigis Junularan Sekcion de K.E.I., kiun gvidos stud-ino Mariana Buca el Timisoara.

Enkadre de la scienca sesio, okazinta posttagmeze la 13-an de septembro — krom la prezentado de du libroj far K. Bilous-Nagy — oni aŭskultis ok sciencajn komunikaĵojn: doc. d-ro C. Apreotesei (Timisoara) **La estonteco de la lingvoj kaj la lingvoj de la estonteco,** prof. R. Poenaru (Timisoara) **Lingvo kaj instruado; pedagogia deontologio de la instruo de l'internacia lingvo,** d-ro A. Boia (Bukureŝto) **„Falsaj amikoj" en E por la parolantoj de la rumana,** stud. Fl. Bociort (Timisoara) **La rilato modelo-koncepto en la scienca ekkono,** laboristo M. Vochin (Bukureŝto) **El la historio de la E-movado en Rumanio,** stud-ino Mioara Dobre (Timisoara) **La pronomo en E kaj la rumana,** stud-ino Mariana Buca (Timisoara) **La participo en la latina kaj E,** asist. C. Dominte (Bukureŝto) **Homonimio kaj lingvaj „virtoj" en planlingvo (surbaze de esp-lingva materialo).**

La unua tago de la Interkonsiliĝo finiĝis per „Interkona vespero", okazinta en la salonoj de la Universitatana Domo.

La 14-an de septembro okazis, kiel kutime dum dua tago de ĉiu Interkonsiliĝo, la disvolviĝo de riĉa kaj varia kulturarta programo — en la rumana kaj E — konsistinta el la jenajeroj: 1. Prezentado de la kanto **La birdetoj dormetantaj** laŭ la versoj de M. Eminescu elrumanigitaj de J. Petrin, far viŗa triopo el la ĥoro „Schubert", 2. Legado de la bonhumora poeziaĵo de G. Cosbuc, **Malbona pagantino,** elrumanigita de C. Dominte, 3. Prezentado de la filmeto **Valo de Liman',** pri folkloraj kutimoj en la rumana sudokcidenta distrikto Timis, 4. Esp-lingva kantado far gea triopo el Odorhei (K. Bilous-Nagy, J. Józsi, L. Márton), 5. Plurrola legado de la teatraĵo **Necesa dialogo,** akre idea debato pri Esperanto verkita de „Anonymus Esperantiensis", kiu ĝuis apartan intereson de la ĉeestantaro, 6. Legado de **Poemo** de Aurel Boia, far la aŭtoro mem, gajninto de mencio en BK, Stokholmo 1980, 7. Legado de la poeziaĵo de Eminescu **Preter la poploj sen kompar'** (elrum. de J. Petrin) far M. Vochin, 8. Deklamado de la optimisma poemo **Tamen** (de A Boia) far d-ro V. Paltineanu, 9. Kantado kun piana kunludo far operkantistino el Timisoara, s-ino Branisteanu, 10. Aŭskultado de kelkaj surbendigitaj poemoj: **Venezio** de Eminescu, elrum. de P. Firu, **Tri vizaĝoj,** de L. Blaga, elrum. de Eŭgenia Morariu, kaj versaĵon de W. Auld, 11. Konciza geografia kaj historia priskribo de Timisoara far la gazetisto Franz Engelmann, el la redakcio de la ĵurnalo „Neuer Weg" en Bukureŝto. Per la plimulto de la esperantigoj el la verkoj de Eminescu, oni implicite omaĝis la 130-jaran datrevenon de la naskiĝtago de l'plej reprezenta rumana verkisto.

La III-a- Interkonsiliĝo finiĝis per estrara kunsido, dum kiu oni ellaboris rekomendojn kaj atestilojn por nombro de kursgvidontoj de E.

Rumana vortaro

Jus aperis en Bukureŝto „Dictionar Esperanto-Român cŭ un compendiu de foneticá, lexic si gramaticâ Esperanto". Gi ampleksas 385 paĝojn, redaktita de univ. asist. C. Dominte, I. Prioteasa kaj studentoj D. L. Ilin, J. Marin, E. Petruc kaj A. Soare.

Eldonis ĝin „Universitatea din Bucuresti, Facultatea de limbi si literaturi stráine, Colectivul Esperanto-Interlingvisticá".

53. Kongreso de SAT en Rijeka

400 kongresanoj el 18 landoj kolektiĝis en Rijeka, jugoslavia havenurbo, kie okazis inter la 19a kaj 25a de julio 1980 la 53a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.

En sia rezolucio la kongreso substrekis, ke ĝi „konscias, ke la nura eliro el la nuna kriza kaj militdanĝera mondsituacio estas kreado de nova pli justa ekonomia mondsistemo, egalrajta kunlaboro inter landoj, ĉiuj kulturaj, klerigaj kaj sindikataj organizoj . . ." kaj „notas la bezonon detale trastudi ricevitan proponon pri kunlaboro kun Mondpaca Esperanto-Movado (MEM) kaj esploris eblecon pri kunlaboro kun ĝi kaj same kun ĉiuj aliaj Esperanto-organizoj".

Iom maljuna civitano interparolis kun ni en neperfekta germana lingvo. Mia demando: „Ĉu vi parolas Esperanton?" Li: „Bedaŭrinde ne!" Sed li rakontis al ni pri Zamenhof: „Ekzistas strata nomo, aŭtobushaltejo laŭ li, kaj mi scias, kie estas la tombo." Ni estis surprizitaj kaj aŭskultis atente. Poste li proponis al ni sian akompanadon al la tombejo.

Starante ĉe la tombo de la kreinto de la internacia lingvo ni estis plenigitaj de grandega ĝojo. Estis feliĉa sento por ni! Ni havis la varman deziron, ke ĉiuj esperantistoj plulaboru en lia senco, por ke la lingvo Esperanto disvastiĝu en la tuta mondo, je la bonfarto de la homaro, por paco kaj popola interkompreniĝo!

Charlotte Tomat

Esperanto en la radio 1979

En la jaro 1979 el 14 radistacioj en 11 landoj sur 3 kontinentoj okazis 2983 elsendoj, kiuj daŭris kune 1082 horojn.

Plej multe da elsendoj havis Pola Radio (1095 dum 547,3 horoj) kaj Radio Pekino (448 elsendoj dum 222 horoj). Sekvas Portugalio, Aŭstrio kaj Vatikano.

(En 1978 okazis 2788 elsendoj dum 1018 horoj.)

(el „esperantist 80/2)

Travivaĵo

En septembro ĉi-jare mi kun mia edzo pasigis unu semajnon en Varsovio kiel turistoj.

Tagon post tago ni estis survoje, serĉis multe da vidindaĵoj, ĝojis pri novaj kaj malnovaj konstruaĵoj, pri la pola helpemo kaj gastameco.

Sed unu tago precipe restos neforgesebla por ni. Estis la 20a de septembro. Ni staris apud la Getto-monumento kaj memoris pri la sennombraj viktimoj fare de la Hitler-faŝismo.

Honorigo al d-ro Pethes

Dum kunsido de la Mondpaca Konsilio en Sofio oni reelektis prezidanto la nelacigeblan pacbatalanton, Romesh Chandra.

En la novan Prezidion de la Mondpaca Konsilio estis elektita d-ro Imre Pethes, prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, vicprezidanto de HEA.

Centra Laborrondo Esperanto tre kore gratulas al k-do Pethes pro la honorigo kaj deziras al li pluan aktivan laboradon.

Oni povas ĝojinde konstati, ke tiaj interkonsiliĝoj fariĝas tradicio de K.E.I kaj la notitaj ĝis nun atingaĵoj pravigas la esperojn de la K.E.I.-anoj, samkiel de ĉiuj rumanaj E-parolantoj, je aliaj estontaj sukcesoj, sub la gvido de la devizo lanĉita de prof. d-ro I. Fl. Bociort: „Ni enkonduku Esperanton en la sciencon. Ni enkonduku la sciencon en la tutan Esperanto-agadon". Ja ĉefe sub la aŭspicioj de tia reciproka integriĝo de la scienco kaj la internacia lingvo oni atingis la plimulton de la ĝisnunaj rezultoj depost la estiĝo de K.E.I., fine de majo 1978.

Constantin Dominte
Sekretario de K.E.I.
(S. R. Rumanio)

Literaturangebot

1.	Hermann Göhl: Ausführliche Grammatik des Esperanto, Berlin 1976, 295 S.	M 6,—
2.	Heinrich Böll: La perdita honoro de iu Katarina Blum, Leipzig 1978, 154 S.	M 10,—
3.	Esperanto: Ni kantas, Berlin 1980, 58 S.	M 5,—
4.	Esperanto: La internacia lingvo — sciencaj aspektoj, Berlin 1979, 237 S.	M 9,—
5.	Begleitmaterial zum Selbstunterricht, Berlin 1979, 74 S.	M 4,—
6.	Begleitmaterial für Kursleiter, Berlin 1978, 74 S.	M 6,—
7.	Glier/Weißbach/Müller/Conrad: Zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im Ergebirge/Vogtl. (1907—1933), Karl-Marx-Stadt 1976, 39 S.	M 2,—
8.	Ursula Gärber: La flago de Krasny Sulin, Schwerin 1979, 31 S.	M 1,—
9.	Erni Krusten: Okupacio, Tallinn 1972, 90 S.	M 1,20
10.	Estona Soveta Poezio, Tallinn 1977, 203 S.	M 1,50
11.	A. H. Tammsaare: La mastro de Korboja, Tallinn 1976, 160 S.	M 2,—
12.	Juhann Liiv: Al abelujo ĝi flugas, Tallinn 1980, 158 S.	M 2,—
13.	Vladimir Beekmann: Lumo de orienta Eŭropo, Tallinn 1978, 47 S.	M 1,20
14.	Skizoj pri la Usona Novkoloniismo, Hanoj 1973, vol. III, 217 S.	M 1,50
15.	Vo Nguyen Giap: Neforgeseblaj tagoj III, Hanojo 1975, 201 S.	M 2,—
16.	Vu Kan-Hoang Nguyen: Kampuĉio — La nigraj jaroj, Hanoi 1979, 153 S.	M 2,—
17.	Ĉeĥoslovakio: Tridek jaroj, Prag 1976, 50 S.	M 1,—
18.	Kanto super lulilo (8 slov. aŭtoro), Prag 1976, 30 S.	M 2,50
19.	Petr Bezruĉ: Sileziaj kantoj, Prag 1970, 130 S.	M 1,—
20.	Julius Fuĉik: Riporto skribita en la pendumila maŝo, Prag 1979, 110 S.	M 7,90
21.	Poŝatlaso de la mondo, Prag 1972	M 12,60
22.	Kio estas MEM? Prag 1968, 28 S.	M 1,—
23.	SAEST 1980, Kolekto de la seminariaj referaĵoj: Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, Prag 1980, 104 S.	M 8,—
24.	Alicja Szlazakowa: Janusz Korczak, Warschau 1979, 141 S.	M 10,—
25.	Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Budapest 1978, 228 S.	M 10,—
26.	Endre Ady 1877 — 1919, Budapest 1977, 39 S.	M 1,—
27.	Systemübersicht der Anpassung der Deutschen Stenografie an die internationale Sprache Esperanto, Berlin 1979, 12 S.	M —,80
	Esperanto-Abzeichen (Kulturligo de GDR), Durchmesser 14 mm	M 2,—
	Faltblätter: Kennen Sie Esperanto?	M —,05
	Esperanto-Postkarten „Traditionsschiff“	M —,20
	Postkarten „Traditionsschiff“ (viersprachig inkl. Esperanto)	M —,20
	Prospekt: 7 tagojn en Rostock	M 1,—
	Prospekt: Rennsteig-ĝardeno Oberhof	M —,50
	DDR-Paco 1973, 1974, 1975, 1976, 1977, 1978, 1979	M —,50
	DDR-Paco 1980	M 1,—

Skribas nia leganto d-ro inĝ. Wolfgang Müller el Neubrandenburg

Ĉu ni estas sur la ĝusta vojo?

Antaŭ nelonge mi ricevis leteron de amiko el Sevetunio, kiun li titolis: „Per Esperanto por mondpaco kaj amikeco inter la popoloj“.

Jes! Al vera paco ankaŭ apartenas, ke la homoj de la mondo kapablas interkompreniĝi. Sed kiom da esperantistoj ekzistas?

Estas multaj esperantistaj aranĝoj, kiuj respondas al la plej altaj postuloj. Ĉu vi konas la bonegan senton kontakti esperantistojn el pluraj nacioj, interparolante kun ili plena da ĝojo? Certe!

Ĉu vi konas landon, kie oni uzas ekskluzive Esperanton? Ne? Mi ĝin konas. Estas tie, kie estas esperantistoj. Ĉu tio sufiĉas? Tamen ne sufiĉas leterinterŝanĝo, ne sufiĉas urbaj, subdistriktaj, distriktaj kaj aliaj kunvenoj! (daŭrigo p. 42)

Mozaiko el GDR

ernationale Gesellschaft für den Transcontainerverkehr.
INTERFRIGO: Abk. für Société Ferroviaire Internationale de Transports Frigorifiques, Internationale Gesellschaft der Eisenbahnen für Kühltransporte.
Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Abk. **IFEF**: Internationale Eisenbahner Esperanto-Föderation
Internationale Eisenbahner-Esperanto-Föderation, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (esp.), Abk. **IFEF**: Fachverband

allem den
km Meter-
ur vor. Zur
oiche Strek-
ahezu aus-

nitee, Abk.
portkomitee

ee der
i Comitee
rgan der →
der Verein-
pa (ECE) für
oblemen des
orts mit den
uropäischen
nenverkehrs-
Das ITC soll
allgemeiner
n, die ver-
des Inland-
n, mit ande-
ganisationen
Transports
mpfehlungen
internatio-
führung

der Eisenbahner zur Pflege des Esperanto; eine der bedeutendsten Esperantofachverbände, dem Esperanto-Weltbund (UEA) angeschlossen, und eine der ältesten spezialisierten Esperantovereinigung.
Während des Weltkongresses der UEA 1909 in Barcelona wurde von den Eisenbahnern eine eigene internationale Vereinigung unter dem Namen *Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj* (IAEF) ge-

Poŝleksikono „Fervojo-Internacie"

En la transpress-eldonejo Berlin (GDR), eldonejo por trafiko, aperis 1980 la poŝleksikono „Fervojo-internacie" (Eisenbahn-international). Apud la prezentado de kompareblaj informoj kaj evoluaj procedoj de la internacia fervoja trafiko kaj priskriboj pri organizaĵoj, konvencioj, tarifoj kaj asocioj de la fervoja trafiko estas prezentita ankaŭ la „Internacia Fervojista Esperanto-Federacio" (IFEF) kun 90 linioj.
La leksikono (sume 264 paĝoj) estas ricevebla en la librovendejoj kaj mendebla sub la menda numero 566 052 (7,80 M).

Kontrakto inter Česke Budéjovice kaj Suhl

La 17an de januaro 1981 reprezentantoj de la esperantistaroj de Ceske Budejovice/CSSR kaj Suhl/GDR subskribis kontrakton pri amikeco kaj kunlaboro.

En „Berliner Rundfunk"

La GDR-stacio „Radio Berlin", studio DT 64, disaŭdigis la 7an de novembro 1980 konkursdemandon pri Esperanto kaj la 21an de novembro solvis la demandon anoncante la gajnintojn.

„Mia geedziĝo kun la reĝidino"

En tiu samtitola romano de Peter Abraham („Meine Hochzeit mit der Prinzessin", Berlin 1972) oni kelkfoje trovas informojn pri esperantisto, kiu havas multajn internaciajn ligojn kaj eĉ donas iujn informojn pri Esperanto kaj lingvajn specimenojn de la lingvo (p. 85/86, 145).

En la blindula gazeto „Die Gegenwart"

Jam dufoje s-ro Horst Arkuszewski el Berlin publikigis materialojn en la nigrapresa revuo de la „Asocio por blinduloj kaj malbone vidantoj" de GDR. En n-ro 4/80, p. 81, aperis artikolo el la brajla esperantlingva revuo „Aŭroro" 6/79, pri la blindula kooperativo en Levoča/ČSSR kaj en n-ro 6/80 pri la centra biblioteko de la pola blindula asocio prenita el la brajla Esperanta revuo „Pola Stelo" 1/80.

Gratulon pro scienca premio

En „Universitätszeitung" de la Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg 1980 oni legis, ke la juna instruistino por fremdaj lingvoj, Sabine Liesecke, ricevis kiel studentino la „Adam-Kuckhoff-Premion" en arĝento por partopreno en scienca konkuro. La instruistino nun gvidas Esperanto-kurson en la popola altlernejo Leipzig. Gratulon kaj sukceson.

Ni devas elrompi el niaj limigitaj vesperoj de komencantoj kaj progresantoj, ni devas internaciigi nian agadon.
Kie estas la esperantistaj filatelistoj, numismatikistoj, akvariistoj kaj aliaj „istoj", kiuj enkondukos siajn eksterlandajn Esperanto-amikojn en siajn laborgrupojn, bone interpretante kaj montrante la facilan kompreniĝeblecon?
Kie estas la sporta konkurado kun ĉeesto de eksterlandaj esperantistaj sportistoj, kiuj estas prizorgataj per esperantista ekzemplodona enlandano?
Kie estas la kunsido de fakuloj, kie oni povas aŭskulti almenaŭ unu prelegon en Esperanto tradukendan nacilingven?
Ni ofte tro multe parolas kaj skribas pri la facila kompreniĝebleco en Esperanto, tamen, ni devas montri tiun econ al neesperantistoj. Certe ne estas simple, tion solvi. Sed nepre oni devas komenci de sube, etpaŝe. Sed oni devas komenci, ĉu ne?



Novaj koloraj prospektoj pri Rostock

„7 tagojn en Rostock“ ilustras multkolora moderna prospekto pri la ĉebaltmara urbo, 25 fotoj kun teksto, urbmapa skizo kaj programpropono por septaga restado en la urbo enestas en tiu ĉi beleta informilo, eldonita de Rostock-Information (2500 Rostock 1, Lange Str. 1). Eksterlandanoj petu tie, esperantistoj el GDR (kontraŭ unu marko) ĉe Distrikta Laborrondo (Werner Plate) Esperanto/Kulturbund, 2500 Rostock, Kröpeliner Str. 25, aŭ ĉe CLE.
Kaj krome aperis en Rostock kolora bildkarto pri la muzea ŝipo tipo Paco en Rostock kun esperantlingva surskribo. Ricevebla ĉe CLE (20 pfenigoj).

El letero de G. Pirlot, Belgio:

„Artikolon de s-ro W. Pfennig, ‚Plibonigo de gvida laboro', mi trovis i. a. pritraktinda, sed mi miras ke li ne parolas pri la celoj de varbado!
Multaj komencantoj forlasas la movadon — **pravege!** — kiam ili konstatas ke, per Eo, ili povas tre malfacile fakkleriĝi kaj ke, ĝis nun, la lingvo ne sufiĉe utilas por profesiaj celoj. Tro ofte, ni povas nur proponi al novbakitaj ke ili fariĝu ‚verdaj misiistoj' kaj ‚porĉiamaj E-propagandistoj'!
Feliĉe kelkaj ekkonscias pri tiu grava manko kaj dediĉas pli da atento al la fakagadoj; mi pensas i. a. pri ‚Budapeŝta Informilo' — kiun mi abonas — kaj pri HEA. Ĉu ‚der esperantist' ne povus sekvi tiun admirindan ekzemplon?“

„Fervojistaj Novaĵoj“

Tiel titolas la malgranda sed enhavoriĉa bulteno de la Fakgrupo Fervojistoj-Esperantistoj ĉe CLE. Jam aperis 4 numeroj. La kajeretoj estas klare fotoreproduktitaj kaj enhavas abundon da informoj. En n-ro 1 (1/79) ni legas pri la planoj kaj la laboro de la fakgrupo mem, kiu fondiĝis la 16an de novembro 1977. (Prezidanto elektiĝis Achim Meinel, vicprezidanto estas Horst Jasmann; al la estraro plue apartenas Horst Theurich kaj Heinz Hoffmann.)
Plue ni legas artikolon pri internaciaj aktivecoj de fervojistaj esperantistoj, trovas informojn pri la IFEF-kunveno dum la 63a UK en Varna, memorojn de laborista esperantisto.
En n-ro 2 (2/79) ni legas pri la fervoja linio Dresdeno—Leipzig, pri kunsido de la fakgrupo kaj konatiĝas kun interesa eksperimento en la stacidomo Dresden. Tie oni donis per laŭtparolilo esperantlingve informojn pri trajnoj kaj poste enketis la homojn pri la komprenitaĵo.
Ampleksaj artikoloj informas pri la lingva situacio en UN kaj pri la ebla rolo de Esperanto en fervojaj muzeoj.
En n-ro 1/80 ni legis pri la monda lingvo-problemo kaj en 2/80 troviĝas i. a. fakartikoloj pri la trakciośanĝo sur la fervoja linio Saalfeld—Probstzella—Grüneberg kaj informoj pri la germanlingva poŝleksikono „Eisenbahn international“ („Fervojo internacie“), kiu aperis 1980 en GDR kaj enhavas artikolojn pri IFEF. Kunredaktoro de tiu verko estas Horst Jasmann, redaktoro de „Fervojistaj novaĵoj“.
La bulteno estas ricevebla ĉe la redaktoro Horst Jasmann, 1136 Berlin, Hans-Loch-Straße 305/6.1.

Aplikita scienco

Kibernetikistoj por Esperanto

La tre prestiĝa **Internacia Kibernetika Asocio** organizis sian 9an kongreson en septembro 1980. La oficialaj lingvoj de IKA estis la angla kaj la franca, sed oni eksperimente permesis uzi ankaŭ la Internacian Lingvon. La celo de l'eksperimento estis provi la taŭgecon de l'Interncia Lingvo por sciencaj prelegoj kaj diskutoj. Post la provo — kiu iĝis pruvo! — l'estraro de IKA pridisputis la proponon de ĝia vicprezidanto, prof. d-ro Helmar **Frank,** ke la Internacia Lingvo (Esperanto) estu oficialigota kiel tria laborlingvo de IKA krom la angla kaj franca. Post duhora disputado **oni akceptis la proponon.** La revuo **„Cybernetika“,** ekse dulingva, estos trilingva; dum la sekva 10a kongreso de IKA en 1982 oni uzos E-on jam ne nur eksperimente, sed komplete egalrajte je la aliaj du lingvoj. La statutoj de IKA estos tradukataj en la Internacian Lingvon, kiun IKA uzos ankaŭ en sia korespondado kun aliaj fakaj asocioj ekster la angla kaj franca lingvo-teritorioj.
Ĉi tiu frapo kontraŭ la diskriminaciemo tuj ekefikis je la internacieco de IKA. La nun eksiĝinta estraro enhavis po 3 angla-lingvajn kaj franca-lingvajn, kaj nur 1 alilingvan membron. La jus elektita nova estraro enhavas po 3 membrojn el la angla, franca kaj cetera lingvo-teritorioj. El la 9 novaj estraranoj 5 scipovas la Internacian, inter ili la prezidanto prof. d-ro **Boulanger,** la vicprezidanto prof. d-ro **Frank,** krome prof. d-ro **Pennachietti,** membro de l'Akademio de Esperanto, prof. d-ro **Sangiorgi,** kaj s-ro **Ören.**
Ni kore gratulas al niaj amikoj, kiuj sukcesis trarompi la „magian cirklon“. Oni ne oficialigas la Lingvon Internacian, ĉar ĝi ne estas disvastiĝinta, kaj oni ne vaste uzas ĝin, ĉar ĝi ne estas oficialigita . . .
Sciencistoj kaj libraristoj! Abonigu la revuon „Cybernetica“ (eldonatan en Belgio) per via faka libraro! Anoj de sciencaj asocioj! Sekvu la ekzemplon de la kibernetikistoj!

Antal Münnich
(El „Budapeŝta Informilo“ 11/80)

Budapeŝtaj Komputistoj kaj Komputilistoj

En decembro 1979 fondiĝis grupo de komputistoj kaj komputilistoj en Budapest. Ĝi konsistas el 32 fakuloj. Ili kunvenas unufoje ĉiumonate por prelegoj kaj raportoj de la diversaj laborgrupoj. Ilia aktivado dividiĝas en kvar agadkampoj:
1. perkomputila laboro, 2. faka literaturo, 3. publikigado, 4. informado.

1. Apud ellaboro de programata lingvo surbaze de Esperanto ili intencas verki programon por traduko de Esperanta faka teksto al la hungara lingvo. Tiucele ili daŭrigas la komputilan prilaboron de PIV. Krome ili volas uzi demando-respondo-sistemon PREDIS kaj la apartenan datumbazon.
2. Per traduko de resumoj kaj artikoloj el la hungara kaj per verkado de artikoloj pri komputado la grupo provizos la tradukservon de SRES (Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj) kaj pliampleksigos la datumbazon de PREDIS.
3. Per eldono de komputista bulteno E + K ili volas publikigi rezultojn pri Esperanto kaj komputado kaj akceli la internacian kunlaboron sur tiu kampo.
4. Grava laborpunkto estas ankaŭ la informado de neesperantistaj samfakuloj pri la ebloj de uzado de Esperanto per nacilingvaj artikoloj, prelegoj kaj konigo de la ekzistanta datumbazo.

Interesuloj sin direktu al: Budapeŝta Grupo Komputista, Budapest H-1368, Pf. 193.

D-ro M. Schüler

Samfakuloj serĉataj

Fiziko, Matematiko, Komputiko
Jan Bolewicki, Rynek 9, PL-63-730 Pogorzela woj. Leszczynskie, Pollando.

Vitkulturado
Inĝ. Frantiŝek Havlik, agronomo-vitkulturisto, JZD „DUKLA“ (Unueca Agrokultura Kooperativo) Vracov, distrikto Hodonin, Mechanizace 94385, PSC 69642.

Botanika Vortaro
Serĉas samfakulojn por kompili plurlingvan botanikan vortaron F. Mlynár, Králická 689, CS - 563 01 Lanŝkroun, Ĉeĥoslovakio.

Poligrafia terminaro
Mi kompilas poligrafian terminaron kaj bezonas diverslingvajn (aŭ multlingvajn) vortarojn pri tipografio, presarto, eldonaferoj. Bonvolu proponi al: Nikolaj Starodubcev, abonkesto 613, SU - 340092 Doneck, Sovetunio.

En la organo de la fervojistaj sindikatoj „Fahrt frei“ (Ekveture) en n-ro 26/1978 aperis artikolo pri la legenda „Orienta ekspreso“. La materialo estis prenita el „Hungara Fervojista Mondo“ 3/1979.

„Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko 1980“

Kun kontento oni povas pli kaj pli ofte registri seminariojn kaj aliajn sciencajn aranĝojn, ĉu naciajn aŭ internaciajn, traktantaj Esperanton kiel sciencan esplorobjekton respektive kiel lingvon por fakscienca apliko. En la ĉi-rilate rezultorića jaro 1978 rimarkinda estis i. a. la seminario „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko“, organizita de la scienc-teknika Sekcio de ASSR en Žilina. Jam du jarojn poste denove okazis seminario kun tiu kadrotemo en Usti n. L./Ceĥoslovakio, cifoje organizita de la Scienca-Teknika Sekcio de ČEA. Ambaŭ seminarioj estis bonege preparitaj, eĉ sciencnivele, kion i. a. atestas la fakto, ke la prelegoj jam **antaŭ** la seminarioj aperis presitaj kaj disponiĝis al la partoprenontoj. Tio sendube ebligis profundan preparon kaj pli fruktodonajn diskutojn. La kolekto de la seminariaj referaĵoj de Žilina ampleksis 81 paĝojn kun entute 16 referaĵoj (krom slovakaj kaj ĉeĥaj aŭtoroj ankaŭ 2 el Bulgario kaj 1 el GDR). Pri tio amplekse recenzis E. Würker en „der esperantist“ 2/1979. La kolekto de la seminariaj referaĵoj de Usti n. L. ampleksas 104 paĝojn kaj disdividiĝas en du temo-grupoj. La aŭtoroj venas el tri landoj (14 ČSSR, 4 Hungario, 2 GDR). Jen la titoloj:

I. La vivomedio hodiaŭ kaj morgaŭ

1. V. Novobilský (ČSSR): Eduko al zorgo pri la vivomedio
2. L. Tichy (ČSSR): La vivomedio kaj la sano
3. A. Lukàcs (Hungario): Pri la ŝanĝado de la vivomedio en Hungario
4. J. Kříž (ČSSR): Problemoj de la protektado de la atmosfero en ČSSR
5. J. Hálek (ČSSR): Kunekzistado de la urbo kaj la kemio
6. H. Landsperský (ČSSR): Nuklea industrio kaj la vivomedio
7. O. Haszpra (Hungario): Regionaj efikoj al la grundakvo far la Akvonodaro Gabĉikovo-Nagymaros
8. J. Černy (ČSSR): Ekologiaj kondiĉoj kaj la vivomedio en Subercmontaro en la distrikto Most
9. Z. Pluhař (ČSSR): Agrokemiaĵoj kaj la vivomedio. 1. La kromefikoj de la industriaj sterkaĵoj
10. Z. Pluhař (ČSSR): Agrokemiaĵoj kaj la vivomedio 2. La kromefikoj de la industriaj biocidoj

II. Problemoj de la faka lingvo kaj traduko

1. D. Blanke (GDR): Lingvoplanado en planlingvo. La esperantologio, ĉu priskriba aŭ preskriba scienco?
2. J. Werner (ČSSR): Faklingvaj principoj de vorta elekto kaj formigo
3. J. Kořinek (ČSSR): Problemoj de tradukado
4. B. Golden (Hungario): Kelkaj problemoj rilate la ellaboron de arkeologia fakterminologio en Esperanto
5. R. Partecke (GDR): Temo kaj amplekso de mikroelektronika fakvortlisto
6. Z. Pluhař (ČSSR): Konciza historio de la nomenklaturoj en kemio
7. Z. Pluhař (ČSSR): Problemoj de la sistema kemia nomenklaturo en la Internacia Lingvo
8. J. Kavka (ČSSR): La fonemo ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio
9. K. Traxler (ČSSR): Problemoj de la jura terminologio en Esperanto
10. B. Révész (Hungario): Faktraduka agado de la Budapeŝta Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj.

Mi ne volas prijuĝi la unuopajn kontribuojn, ĉar tion devus fari la koncernaj specialistoj, sed nur substreki: la valoro de la kolekto kuŝas en la diversfaka trakto de la du kompleksaj temoj kaj en la faklingva apliko de Esperanto kun sendube terminologiaj rezultoj. Vojo — nepre sekvenda. Iom strange impresas la sistema apliko de la fonemo ĥ, eĉ en tiaj vortoj, kiuj jam ĝenerale uziĝas en la k-formo (kemio, tekniko). Kvankam J. Kavka tre detale pledas por la ĥ-fonemo, mi taksas tion kelkloke troigo. La preso estas pura. Supozeble la eldono (nur 500 ekzempleroj) rapide elĉerpiĝas. Mendojn akceptas CLE. La verko kostas 7 markojn.

E. Würker

Interlingvistiko en Vilnius

Scienca Konsilantaro de Filologia Fakultato en Vilniusa universitato konfirmis programon de kurso pri interlingvistiko. La kurso estas instruata unu duonjaron al studentoj-filologoj de la kvara kurso kaj finiĝas per konfirmo (t. e. plifaciligita ekzameno). La kurson gvidas docento A.-L. Skŭpas.

(Horizonto de Soveta Litovio, 5//1980)

Recenzoj

SK-79

La „Sciencaj Komunikaĵoj 1979“, aldono de „Budapeŝta Informilo“ enhavas 15 rimarkindajn kontribuojn pri arkeologio, geologio, sistemteorio, biokemio, medicino kaj akvomastrumado.

Laŭ proporcio, SK-79 ŝajnas kajero ĉefe por medicinistoj kaj akvomastrumadistoj, ĉar 10 el 15 artikoloj pritraktas tiuspecajn problemojn. Konkludo el tio estas permesata, ke la apliko de la internacia lingvo Esperanto por la medicina kaj akvomastrumada sciencoj estas plej progresata.

Des pli granda estas la intereso de nemedicinistoj por la kontribuoj, kiuj informas pri aliaj sciencoj.

Pri **subakva arkeologio** (Golden) ni ekscias sciencan difinon, specifajn trajtojn, specialajn laborproblemojn, labormetodojn kaj laborrezultojn. Por plilongigi la tempodaŭron de laboro subakve estis konstruitaj submarŝipetoj. Eble en la estonteco, subakvaj arkeologoj laboros ne de bazo sur ŝipo aŭ apuda marbordo, sed en subakva domo sur la fundo tuj apud la esplorotaj restaĵoj. Interalie temas pri boatoj kaj ŝipo subakviĝantaj, kiuj troviĝas en „Tombejo de Atlantiko“ ĉe la orienta marbordo de Usono en la regiono de kabo Hattaras. Tie pereis pli ol 500 ŝipoj dum la pasintaj 400 jaroj, de la brita „Tiger“ (1585) ĝis kargo- kaj cisternoŝipoj, torpeditaj de germanaj submarŝipoj dum la dua mondmilito.

Estas konate, ke la scienco, paralele kun sia evoluo, senĉese diferenciĝas. Nur specialistoj ekzistas, kiuj havas ĝisfundan scion nur pri sia propra, strikta esplorkampo. La tutaĵo de la scienco dispeciĝis, disfalis en fragmentojn, perdiĝis la interrilatoj inter la fakoj, kaj ĉiu branĉo aparte ellaboras eĉ sian teorian strukturon. Sed ankaŭ komenciĝis elformiĝi la kondiĉoj de integriĝo jam fine de la pasinta jarcento. Aperis limterenaj sciencoj. Paradigmoj determinas la problemojn rimarkindajn kaj esplorindajn, kaj ankaŭ la ĝenerale aplikajn metodojn de esplorado. Laŭ **sistemteoria koncepto** pritraktas d-ro (ino) Gal la paradigmon pri la unueco en la naturo.

Artikolo de usona profesoro Lewin plifortigas per siaj esploroj la teorion de rusa botanikisto Mereskovskij (1905), asertante, ke tiuj hloroplastoj evoluis de unuĉelaj algoj **(„simbiogenezoteorio“)**.

M. T. Popov pritraktas la temon „Komplementeco de ŝarĝaĵoj de elektronaj tavoloj en paroj de ĉefaj bazoj de desoksiribonukleata acido **(DNA)**.“

Modele klara kaj profunda estas **„La kvadrata faligilo,** flankaflua mezurado de la akvokvanto sen interrompo de la libera akvosurfaco“, verkita de prof. d-ro inĝ. Haszpra.

Sed ankaŭ **„La evoluo de la mongola akvomastrumado“** kaj **„Stato kaj utiligo de la akvohavaĵo de Kubo“,** tradukaĵoj el eksterlandaj fakĵurnaloj, bone informas, same kiel **„Akvo kiel produktaĵo“** de inĝ. Bednařík.

La medicinaj artikoloj pritraktas **la atoplian malsanon, psikologion en infansana centro, malutilojn de la fumado, okuldifektojn ĉe publikvojaj akcidentoj** kaj **la bestkuracistan laboron por la homa sano,** krome **„Pensoj pri la tempo kaj pri la vortoj“.**

SK-79 peras ankaŭ tre aktualajn informojn pri la XII-a konsultiĝo en Visegràd. Oni ekscias pri pretaj kaj preparĝantaj vortaraj manuskriptoj de HEA.

Kun granda ĝojo ni ekscias, ke „SK“ ricevos fraton, la „Teknikajn komunikaĵojn“. Ni senpacience atendas ĝin kaj esperas ricevi ĝin pere de CLE aŭ pere de la Domo de la Hungara Kulturo en Berlino.

Ni ŝuldas grandan dankon al la komisiono pri Sciencaj kaj Fakaj Aplikado de HEA, speciale al d-ro inĝ. Haszpra kaj liaj kunlaborantoj pri ilia preciza kaj profunda scienca Esperanta laboro.

K. D. Dungert

Ni kantu! Finfine

Eble tiel krius diversaj kursestroj aŭ anoj de niaj Esperanto-grupoj. Nu — ne ĉiu havas belan voĉon aŭ kapablas kanti. Tamen, la ebleco nun ekzistas pli bone ol antaŭe. Ja jus aperis nia kantlibreto sub la sobre konstata titolo „Ni kantas“. Redaktis ĝin Ludwig Schödl. Notojn desegnis kaj redakte kunlaboris Elvira Appel. La libreto prezentas sur 58 paĝoj entute 49 kantojn el la sekcioj I. Batalkantoj antaŭ 1945 (7), II. Batalkantoj post 1945 (8), III. Germanaj kaj internaciaj popolkantoj (11), IV. Kantoj por junularo kaj migruloj (6), V. Diverstemaj kantoj (17).

La libreto estas havebla ĉe CLE kaj kostas 5,— markojn.

En Pedagogia Altlernejo

Pri teorio kaj praktiko de Esperanto prelegis d-ro Detlev Blanke, la 2an de decembro, en la Pedagogia Altlernejo Güstrow. Li traktis tiun temon antaŭ profesoroj, docentoj kaj asistantoj de la sekcio germanistiko kaj antaŭ ĉ. 120 instruistaj studentoj de filologioj.

Du vjetnamaj eldonaĵoj

La vero pri la vjetnam-ĉinaj rilatoj dum tridek lastaj jaroj, 1a eldono; Hanojo: Fremdlingva eldonejo, 1980; 110 p.

Dum la lastaj kvin jaroj la strečoj en la mondo denove pliakriĝis. Sed nia „La mondo" tro ofte koncentriĝas je Eŭropo. En sudorienta Azio ĝis 1975 ekzistis nenia malstreĉiĝo — estis milito. Nur tiam Usono retiris siajn trupojn el SO-Azio, liberiĝis suda Vjetnamio. Kaj la kampuĉia tragedio — kiu povus ĝin forgesi?

Post la batalo kontraŭ Usono Vjetnamio (por rememoro: 43,2 milionoj da enloĝantoj, 332 559 kv. km da teritorio, liberiĝo el sub franca kolonieco en 1945) komence de 1979 sin devis defendi kontraŭ ĉina agreso. Mi esperas ke ĉiu memoras la barbarajn batalmetodojn de la ĉinaj trupoj. Sed kiuj estas la kaŭzoj, ke Ĉinio, iam subtenanta revoluciajn movadojn en la liberiga batalo, ŝanĝis sian politikon kaj agresas kontraŭ lando, en kiu vivas nur 4,5 procentoj de la nombro de la propra enloĝantaro?

Respondon pri tio donas ĉi tiu libro. En Vjetnamio eldoniĝis konsiderinda nombro de esperantlingvaj libroj, kaj post paŭzo la eldonagado rekomenciĝis per „Kampuĉio — la nigraj jaroj". Daŭrigas tiun agadon „La vero pri la vjetnam-ĉinaj rilatoj dum tridek lastaj jaroj".

Laŭ mi du ecoj distingas tiun verkon: la konsekvenca historia metodo kaj la amplekŝa uzo de pruvaj ĉinaj dokumentoj.

La aŭtoroj tre detale priskribas la rolon de Vjetnamio en la ĉina strebado al pli granda politika influo kaj klarigas diversajn poziciojn kaj celojn de Cinio, Vjetnamio kaj la aliaj du hindoĉinaj ŝtatoj en la periodo de la hindoĉina milito (ĝis 1954), en la kontraŭusona batalo kaj post la nacia unuiĝo de Vjetnamio. En tio ili speciale emfazas la hegemonismon, „grandpotencismon" de la ĉina registaro, tamen menciante la subtenon, kiun donis la ĉina popolo al la batalanta suda najbaro.

Do prezentiĝas libro, kiu estas valora por politike interesita homo. Precipe se li ne volas informiĝi ekskluzive per propralandaj gazetoj kaj radioelsendoj. La lingvaĵo havas kelkfoje iom propagandisman stilon — sed tio neniel malaltigas la aprezon, kiun meritas tiu libro.

Michael Lennartz

„Nguyen Trai" (1380 — 1442)

Ĝi estas inda honorigo de tiu nacia heroo okaze de ties 600-a naskiĝdatreveno en 1980.

La 99-paĝa broŝurita libro, ekipita per 2 bildoj, indas esti serioze studata. Iom „skuis" min la multaj fremdaj nomoj de personoj kaj dinastioj. Konantoj de vjetnama literaturo certe ne plu miras pri dirmanieroj, kiuj diferencas de la niaj. Ekz. por: plenumi sian promeson, oni uzas: teni sian parolon. Sed tio certe dependas de la nacilingvo kaj ne melhelpas kompreni la enhavon.

La al ni jam bone konata Dao Anh Kha kaj Nguyen Minh Kinh, Hun Ngoc kaj Vu Khien estas la tradukintoj, kiuj konatigas al ni vivon kaj verkon de tiu unike multflanka batalanto, kiu „distingiĝis samtoje en la beletro kaj en la militarto". . . Samtempe oni ekscias la maltrankvilajn historiajn eventojn, kiuj tiom grave influis vivon kaj agadon de Nguyen Trai. Fortojn, talenton kaj amon li dediĉis al la servo de la patrujo. Ricevinte firman klasikan formadon li doktoriĝis kaj fariĝis en sia dudeka jaro estro de la „Buroo de inspekto kaj kritiko apud la Reĝa Kortego". Post atakoj de ĉinaj feŭduloj li estis devigita vivi ermitan vivon dum 10 jaroj. En tiu periodo li verkis multajn poeziaĵojn pri naturo, patrujo, malproksima hejmo „ . . . veajn pensojn vekas la vento" . . . prezentitaj en la ĉapitroj „Himno al la gloro de l'Chi Linh-Monto", „Poemkolekto en nacilingvo" kaj „Poemkolekto en klasika ĉinlingvo de Uc Trai!

Sed en 1417 li sekvis Le Loi partoprenante 10-jaran naciliberigan militon kontraŭ la Ming-armeo kaj montriĝas kiel lerta diplomato, akravida politikisto kaj brila milita strategiisto. La „Skribaĵoj en la armeo", spicitaj per antikvaj proverboj, parolturnoj kaj saĝaj konsiloj, tion pruvas. La libro finiĝas per artikolo, verkita de la ĉefministro Pham Van Dong okaze de la 520a mortodatreveno de tiu nacia heroo, kiu „porĉiame vivos en la memoro kaj en la koro de Vjetnamoj".

Hella Sauerbrey

Ni funebras

Mortis nia fidela honorofica kunlaborinto kaj esperantisto Max Chamrol, la 20an de decembro 1980.

KORESPONDDEZIROJ 31635

GDR

Richard Grimm, **7260 Oschatz,** Am langen Rain 30, (65j.) dez. kor. tutmonde pri klasika muziko, pentraĵoj, kol. pm

Komencanto, oficisto, 43j., dez. kor. p. ĉ. t.: D. Kaltwasser, **1601 Zeesen,** Saarstraße 28

Lieselotte Thomas, **2756 Schwerin,** Virchowstraße 12, (55j.) faklaboristino por elektronika datumprilaborado, dez. kor. pri literaturo

Bianca Thamm, **2757 Schwerin,** August-Bebel-Straße 33, (22j.) faklaboristino por elektronika datumprilaborado, dez. kor. tutmonde, p. ĉ. t.

Giesela Kratz, **2750 Schwerin,** Buschstr. 11, (40j.) inĝenierino por datumprilaborado, dez. kor. pri turismo, literaturo, teatro, moderna muziko

Christel Piskol, **2620 Bützow,** C.-Moltmann-Straße 4, (25j.) farmaciinĝenierino, dez. kor. tutmonde pri turismo, kaktoj, literaturo, fotografado

Rainer Klützke, **2793 Schwerin,** Neubrandenburger Str. 12, (33j.) gastejestro, dez. kor. pri arthistorio, turismo

Ingitta Pries, **2760 Schwerin,** E.-Bennert-Str. 10, (14j.) lernantino, komencantino, dez. kor. pri sporto, hundoj, moderna muziko, turismo

Hungario

Károly Bebesi, **7625 Pécs,** Ignác u. 2, (60j.) dez. interŝanĝi „Exlibris" kun GDR-esperantistoj

26jara naturamiko, ekskursgvidanto dez. kor. por organizi internacian altmontan marŝadon somere 1981 kun junaj turistoj, kiuj ŝatas ankaŭ la altajn montojn, sed ne estas rokgrimpuloj: István Szél, **1125 Budapest,** Lóránt u. 22

Csaba Langmar, **1213 Budapest,** Csalitos 53, (22j.) dez. kor. pri turismo, sporto, artoj

Svedio

73jara marksisto serĉas korespondanton en GDR, prefere Berlin. Interesoj: ĉefe politiko, etimologio, poezio: Jim Hornö. Seglaregatan 29 A, **414 57 Göteborg**

Pollando

28jara teknikisto dez. kor. p. ĉ. t. kun geesp. el GDR: Stanislaw Klim, **57 200 Zabkowice SL,** ul. Kusociuskiego 19/1

20jara studentino dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, kino, teatro; kol. pm, bk, dispozitivojn, mod-revuojn, gramofondiskojn: Virginia Machnik, **30 201 Kraków,** Emaus 15/14

Instruisto, 25j., dez. kor. kun esp. el GDR pri turismo: Stanislaw Popis, **26 604 Radom,** str. Makowska 8

Sovetia Unio

Geanoj de Esperanto-klubo en Sverdlovsk dez. havi kontaktojn kun esperantistoj el GDR. Bv. skribi grupe aŭ individue al: E-klubo, **620 145 Sverdlovsk,** pk. 287

30jara inĝeniero dez. kor. tutmonde pri tekniko, precipe piedvesta industrio: Eugen Matthies, **483 331 Alma-Ata,** pos. Gres. ul. Titova 29 — 118

Dietrich Matthies, **483 332 Alma-Ata,** Dmitrijevka, ul. Lenina 26, (66j.) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm, librojn

Gintautas Viskaitis, **234 820 Rokiškis,** Taikos 9-a-30, Litova SSR, (17j.) lernanto, dez. kor. pri muziko

40j. instruistino de latva lingvo dez. kor., kol. bk, kalendaretojn, kaj ankaŭ dez. kor. mia infana E-klubo (8 — 15j.). Bv. skribi al Vija Granta, 8-gad skola, IDK, **229 161 Limbažu rajons Pociems**

14jara lernanto dez. kor. kun samaĝuloj, pri kino, tekniko, kol. pm: Igorj Grigorjev, **454 084 Čelabinsk,** pr. Pobedi, domo 166, kv. 125

Aleksandr Tulupov, **660 010 Krasnojarsk 10,** p. k. 2938, (22j.) dez. kor. p. ĉ. t. tutmonde

Kovnators Naumo, **228 400 Daugavpils 17,** p. k. 455, Latvio, dez. kor. pri historio, geografio, lingvoj, interlingvistiko, kol. pm, bk

Esperantistoj-komencantoj dez. kor. tutmonde. Komuna adreso: E-klubo „Flamo", **228 400 Latvio Daugavpils 17,** pk. 455

Herausgeber: Kulturbund der DDR
(Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau

Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 373